


LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

La 12a Esperanto-
kulturpremio de Aalen
estas transdonita
Denove tre sukcesa
ARKONES en Poznano
La franca malpli uzata
Subtekstigo de filmoj
Akademiano Pokrovskij
pri "muta naturo"
Nia omaĝo al Tolstoj
Feliĉo ekster difinoj:
Boris Pasternak
Mario Vargas Llosa
Nobelpremiito el Peruo
La leginda "Ĉashundo"
Kiel fartas la Esperanta
muzika kulturo?



2010

11

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2010. №11 (193)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefona (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2011

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2010.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2010, №11 (193).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 25 октября 2010 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Vortoj de Komitatano Z.

La sengvida cirko

La renova estraro de Probal Dasgupta gvidas UEA jam tri-onan jaron, sed verajn vivosignojn ĝi ne donis. Ŝajnas ankaŭ troige diri, ke ĝi gvidas. Se komunumo havas gvidanton, oni sentas lian ĉeston, sed ĉu UEA estas gvidata, jen la demando. Sekvante retlistojn oni konkludas, ke la gvidanto de UEA estas Renato Corsetti. Eĉ la retlisto de la komitato de UEA igas tiel konkludi. En la raraj fojoj, kiam iu komitatano komentas ion en tiu apatia fumo, la respondo venas de Corsetti, malofte de la prezidanto aŭ alia estrarano.

Ekzemplo pri la gvido-konfuzo estis la tumulto ĉirkaŭ la kontrakto kun redaktoro Stano Marĉek. En Havano la unua estraro de Dasgupta nuligis ĝin kaj decidis anonci konkurson pri la posteno, lasante ankaŭ al Marĉek la eblecon kunkonkursi. Tuj post la publikiĝo de la decido ŝatantoj de la nuna redaktoro ekkolektis nomojn por ĝia nuligo. Ankaŭ en tio aperis manko de reĝisorado. La decido publikiĝis hazarde kaj por tiu neatendita situacio la estraro ne estis preparita. La reta filmpaĝo de UEA montras la farsecan scenon, en kiu Amri Wandel laŭdas la redaktoron kaj tuj poste Barbara Pietrzak kaj Dasgupta anoncas, ke pro multaj kritikoj la kontrakto de la redaktoro estis revokita. Post la kongreso la nova estraro nuligis la nuligon kaj faris novan decidon, kiu daŭrigas la redaktorecon de Marĉek tiom longe, kiom li mem volas.

Interesan malkaŝon pri la kaŭzo en la gvidado de UEA kaj pri postkulisaj scenoj en Havano faris *Libera Folio*. Laŭ ĝi la nova estraro estis timigita de koleriĝo de Humphrey Tonkin pri la intenco serĉi alian redaktoron. Al *Libera Folio* li pravigis sian malkonsenton per nekonvinka klarigo, ke gravas ne la redaktoro, sed la komunika strategio de UEA ĝenerale kaj ĝia retpaĝaro precipe. Ankaŭ sen la intelekto kaj sperto de Tonkin oni scias, ke ne povas esti duarange, kiu redaktas, kaj kiel, la plej gravan revuon en Esperantujo. Pri tia defendo Stano Marĉek mem povas fari al si iom da demandoj.

Kelkaj komentistoj, laŭ kiuj la revuo fariĝis klubeca kaj intelektu anemio, en la fino ĝemis rezignacie, ke se la membraro volas, ĝi havu tian revuon, kian ĝi meritas. Estrarano Wandel prenis aplombe la flankon de la klubanoj kontraŭ “la intelektuloj de *Libera Folio*”. Anna Löwenstein, kiu lanĉis la petskribon en Havano, estas unu el la ideologoj de la klubanoj per siaj plumaĵoj por la “bona lingvo” kaj kontraŭ la “poetoj, kiuj detruas ĝin”. Lastatempe ŝi disvastigis ankaŭ eseon, en kiu ŝi kritikis UEA kiel malmodernan organizaĵon, en kiu nenio ŝanĝiĝas. Ŝi devus ĝojkrii pri la ebleco, ke unu el la plej ŝlosilaj funkciuloj de tiu dinosaŭro povus baldaŭ ŝanĝiĝi, sed ŝia postulo pri ŝanĝoj ne ŝajnas koncerni ŝiajn amikojn. Por kompletigi la cirkon, ŝia edzo Renato Corsetti trovis tute bona la proponon de la estraro pri nova redaktopolitiko, ne rimarkante, ke la teksto, kiun li legis, estis la malnova principaro el 1994. Feliĉe li estas en bona societo: konsulo Silber faris la saman eraron en sia reta tamtamo.

Komitatano Z

La surkovrila portreto de Lev Tolstoj, kreita de Ilja Repin en la aperjaro de la *Unua Libro*, memorigas, ke li forpasis antaŭ cent jaroj, la 7an (20an) de novembro 1910. Ni omaĝas la genian verkiston, pensulon kaj amikon de Esperanto per reaperigo de *Dio – unu por ĉiuj* (p. 14–16).

Dankon!

La 10an de oktobro en la urba biblioteko de Aalen (Germanio) okazis festa transdono de la Esperanto-kulturpremio, kreita de la FAME-fondaĵo kaj la urbo Aalen, kiun ricevis la geedzoj Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov. Ĉi-sube estas la teksto de la dankparolado, legita de Aleksander Korĵenkov.

Karaj gesinjoroj, kolegoj, samideanoj!

Estas granda honoro ĉeesti la hodiaŭan ceremonion kaj esti en la sama vico kun Bill Auld, Itô Kanzi, Bruno Vogelmann, Marjorie Boulton kaj aliaj eminentuloj — multe pli gravaj kaj famaj ol ni — kiuj pli frue ricevis la Esperanto-kulturpremion de la urbo Aalen.

La hodiaŭa festo iusence kronas nian trion-jarcentan Esperanto-laboradon, kiu komenciĝis, kiam ni estis entuziasmaj studentoj, ĝue ekzercantaj la novlernitan lingvon per korespondado kaj legado, partoprenantaj junularajn tendarojn, etosumantaj kun geamikoj. Baldaŭ aldoniĝis dimensio organiza — kluboj, kursoj, ekspozicioj, renkontiĝoj, prelegoj, artikoloj. Poste Esperanto iĝis por ni ne nur la lingvo de gajaj kunvenoj, sed kulturlingvo. Kaj antaŭ 19 jaroj ĝi iĝis ankaŭ nia sola profesio.

Feliĉe, ni ne devas nun rakonti la vojon, kiun ni iris de magraj samizdataj broŝuroj ĝis la verkoj kia *La Mastro de l' Ringoj*. Sed estas nia devo dividi la hodiaŭan honoron kun tiuj, sen kies helpo kaj kuraĝigo hodiaŭ antaŭ vi starus alia(j) persono(j).

Ĉi tial la dankojn kaj la laŭdojn, kiujn ni hodiaŭ ricevas, ni plusendas al ili. Kelkaj jam forlasis ĉi mondon, dum multaj ankoraŭ aktivis en Esperantujo.

Ni dankas al Ludoviko Zamenhof, kies lingvo interkonatigis nin, kaj kies vivo kaj ideoj inspiras nin al plua agado.

Ni dankas al Nikolai Lozgaĉev, Viktor Sapoĵnikov, Aleksej Birjulin, Gafur Gazizi, Andrej Peĉjonkin, Nikolaj Danovskij, Jaan Ojalo, Antonina Apollo kaj al ĉiuj, kun kiuj ni komencis nian kulturan aktivadon.

Ni dankas al Viktor Kloĉkov, Vjaĉeslav Gusev, Aleksandr Karvacki, Viktor Kudrjavcev, Tatjana Kulakova, Jelena Morozova, Viktor Zaĥarov, Nadejda Ŝeveljova, Aleksandr Zagvazdin, Aleksej Aleksandrov, Lidija Jerofejeva, Vladimir Vyĉegjanin, Bronislav Ĉupin kaj al multaj nenomitaj aktivuloj, kiuj helpadis nin dum nia pli ol 20-jara Esperanto-aktivado en Uralo.

Ni dankas al Vilmos Benczik, Árpád Máthé, Ryszard Rokicki, Perla Martinelli, Giorgio Silber, kiuj ebligis al ni en la

malfacilaj kondiĉoj de Sovetunio ekpartopreni la esperantistan vivon internacive.

Ni dankas al Bill Auld, Fernando de Diego, István Nemere, Sergio Pokrovskij, Valentin Melnikov, Daniel Luez kaj al ĉiuj aŭtoroj kiuj disponigis kaj disponigas siajn originalajn kaj tradukajn verkojn al nia eldonejo.

Ni dankas al István Ertl, Peter Baláž, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Serge Sire, Alen Kris, Andrzej Sochacki kaj al multaj konstantaj kunlaborantoj, kiuj helpas ĉiumonate pretigi por vi *La Ondon de Esperanto*.

Ni dankas al Aleksandr Duliĉenko, Ilona Koutny, Detlev Blanke, Humphrey Tonkin, Mark Fettes, Andreas Künzli, Walter Ŝelazny kaj al ĉiuj, kiuj science kaj organize helpas al niaj esploraj, bibliografiaj kaj klerigaj projektoj.

Ni dankas al Flo Martorell, Natalia Strijnjova, Glebo Malcev, Julia Sol, Olga Akunina kaj al ĉiuj, kies voĉo, muziko kaj konsiloj faras nian kulturagadon ne nur papera, sed ankaŭ sona per *Radio Esperanto*.

Ni dankas al Osmo Buller, Pasquale Zapelli, Ionel Oneț, Simo Milojević, Povilas Jegorovas, Marian Zdankowski, Paweł Janowczyk, Eduardo Kozyra, Irek Bobrzak, Elżbieta Karczewska, Tuomo Grundström, Anna Ritamäki-Sjöstrand, David kaj Jean Bisset, Hector Alos i Font, Andreas Emmerich, Natalia



Ŝoroĥova, Anatolij Ionesov kaj al multaj aktivuloj, kiuj diversmaniere helpadis nin kaj transdonis al ni sian grandan movadan sperton.

Ni dankas al la ĵurnalistoj Tamara Lomakina, Irina Klimoviĉ kaj Albert Adylov, kiuj objekte kaj honeste informis kaj informas pri nia agado.

Ni dankas al la perantoj, kiuj diskonigas *La Ondon* en kvardeko da landoj.

Ni dankas al pli ol tridek anoj de la teamo prizorganta la elekton de La Esperantisto de la Jaro, al la juĝkomisionanoj de *Liro* kaj de la Internacia Fotokonkurso; sen ili tiuj projektoj ne ekzistus.

Ni dankas al nia dua generacio — al Aleksej Korĵenkov kiu multe helpas en pretigado kaj ekspedo de la revuo kaj en niaj retroprojektoj, kaj al Tatjana Korĵenkova kiu laŭeble helpas nian laboron.

Ni dankas al ĉiuj niaj legantoj, abonantoj kaj aŭskultantoj, por kiuj ni laboras, kaj danke al kies aĉetoj, abonoj kaj kuraĝigo nia eta profesia entrepreno jam preskaŭ dudek jarojn funkcias en la tre komplikitaj cirkonstancoj de la esence amatora komunumo.

Ni dankas al ĉiuj individuoj, institucioj kaj fondaĵoj, kiuj helpas nin per donacoj, subvencioj, pruntoj kaj premioj. Ni dankas al tiuj, kiuj donace sendas al ni librojn, gazetojn kaj diskojn. Danke al vi ni scias, ke *amikeco, interhelpo* kaj *solidaro* en Esperantujo estas pli ol vortoj.

Ni dankas ankaŭ al niaj konkurencoj kaj kritikantoj — tute sincere, sen vi nia vivo estus malpli interesa.

Fine permesu kore danki al FAME-fondaĵo kiu starigis la Esperanto-kulturpremion, kaj al la Esperanto-Grupo Ale-na, la urbadministracio de Aalen kaj la urba biblioteko, kiuj kune kun la FAME-fondaĵo okazigis la hodiaŭan feston.

Ni estas fieraj pro tio, ke ni estas la unuaj premiitoj el Ruslando, kie Esperanto naskiĝis kaj ekevoluis antaŭ pli ol 120 jaroj, kaj ni promesas ke la premio, kiun vi atribuis al ni, estos laŭeble uzata por subtenado kaj evoluigado de internacia interkompreniĝo kadre de nia agado gazet- kaj libro-eldona, kulturkonkursaj kaj sonprograma.

Koran dankon!

Halina Gorecka **Aleksander Korĵenkov**

La redaktoro de *La Ondo*, kiu reprezentis la gepremiitojn en Aalen, utiligis la tempon por labori en la Germana Esperanto-Biblioteko. Interalie, kun la helpo de Karl Heinz Schaeffer, li trovis kaj kopiis malnovajn artikolojn pri la agado de esperantistoj en Kenigsbergo. (Fotis Marek Blahuš)

Novaj postenuloj en la Akademio

43 akademianoj voĉdonis por elekti la estraron kaj la direktorojn de la Sekcioj kaj Komisionoj de la Akademio de Esperanto.

Kiel estraranoj estis elektitaj: John Wells (prezidanto), Probal Dasgupta (vicprezidanto), Brian Moon (vicprezidanto), Renato Corsetti (sekretario).

Kiel direktoroj estis elektitaj: Christer Kiselman (Faka Lingvo), Otto Prytz (Gramatiko), Bertilo Wennergren (Ĝenerala Vortaro), Marc Bavant (Kontrolado de lerniloj), Alexander Shlafer (Lingva Konsultejo), Paul Gubbins (Literaturo), Probal Dasgupta (Prononco), Carlo Minnaja (Komisiono Historio de AdE).

La estraro de la Akademio

Dankmesaĝo el Pollando

La pollanda ambasadoro en Nederlando, Janusz Stańczyk, peris al la ĝenerala direktoro de UEA leteron de la ŝtata subsekretario, Jaromir Sokołowski, el la kancelario de la Pollanda Prezidento, kiu dankis pro la gratuloj de UEA al Bronisław Komorowski okaze de ties enoficiĝo kiel la pollanda ŝtatestro.

En sia letero Sokołowski skribis, ke “mi volas certigi vin, ke la Prezidento sekvas kun aprezado la aktivadon de via organizaĵo, kiu celas konstrui konsenton kaj dialogon inter la nacioj”.

GK UEA

KAEM konfirmata

La Estraro de UEA konfirmis la konsiston de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) surbaze de balotado okazinta en la ĉi-jara Azia Esperanto-Kongreso.

Kiel prezidanto de KAEM funkcias Sasaki Teruhiro el Japanio kaj kiel vicprezidantoj Wang Ruixiang el Ĉinio kaj Hoang Ngoc Boi el Vjetnamio. Sekretario estas Park Yong-sung el Korea Respubliko kaj kasisto P.V. Ranganayakulu el Hinda Unio. La aliaj komisionanoj estas Muhammad Zubair (Pakistano), Reza Torabi (Irano), Mukunda Raj Pathik (Nepalo), Fajzullaev Ĝamŝid (Taĝikio), Esti Saban (Israelo) kaj Chimedtseren Enkhee (Mongolio).

GK UEA

**Ne forgesu
(re)aboni**



Bunteco bonas

Interkultura Centro Herzberg (ICH) grave kontribuis al la trilanda ago-tago por interpopola kompreniĝo kaj kontraŭ rasismo. Ĝi okazis kadre de la projekto “Vielfalt tut gut” (Bunteco bonas), kiun iniciatis la germana ministerio por familio, maljunuloj, virinoj kaj junularo.

Partoprenis en la projekto Osterode am Harz (Germanio) kun siaj ĝemelurboj Ostróda (Pollando) kaj Scarborough (Britio), kaj Herzberg am Harz (Germanio) kun sia ĝemelurbo Góra (Pollando). La ĉefa kunveno okazis 24 sep en la mezlernejo en Herzberg kun multaj interesaj programeroj: muziko, dancoj, prezentadoj, ekspozicio, ludoj, sporto, informbudoj k.a.

Je 14h30 en la kvin kunlaborantaj urboj oni samtempe flugigis en ĉiu urbo po 500 aerbalonojn kun la teksto “kontraŭ rasismo” en la germana, angla, pola kaj plej grandlitere en Esperanto.

ICH starigis informbudon.

ICH



ILEI kreskas kvante kaj kvalite

Torpedo 6, la faka semajnfino de la germana ILEI-sekcio, okazinta 8–12 okt en la Esperanto-urbo Herzberg, samtempe servis kiel la unua seminario pri subvenci-petado organizita de ILEI. Krome, en sia kunsido la ĉeestantaj estraranoj de ILEI pritaksis kaj planis la laboradon de ĉi tiu instruista ligo.

La membronombro de ILEI proksimas al 700, kaj certe atingos 730 kaj kredeble 750 ĝis la jarfino. Bona rezulto kompare kun 674 en 2009.

Dudeko da landaj sekcioj funkcias adekvate ĝis bonege; pleje bezonas atenton Britio, Irano kaj Ruslando. Aliĝpetoj venis el Serbio kaj Hispanio, kaj povos veni el Kongo DR, Armenio, Meksikio kaj kelkaj pliaj.

ILEI okazigas fizikpoŝtan voĉdonon pri deko da proponoj aŭ dokumentoj. Inter ili regularo por reta voĉdonado. Estas planate ampleksigi la Terminaran Komisionon laŭ diskutoj en KAEST en Slovakio novembre.

Pri la konferenco de ILEI en Kopenhago baldaŭ aperos elektronika aliĝilo kaj detalaj informoj. La konferencoj estos en la universitato de Kopenhago. En la vendredo kaj sabato okazos simpozio, organizata komune de ILEI, la universitato kaj espereble UEA. La konferenca temo: “Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado”. La simpozia temo: “Lingvo de scienca komunikado kaj edukado”.

La estraro ricevis allogan proponon el Ĉinio por la konferenco en 2012.

Laŭ <http://www.ilei.info/>

En la pola kulturcentro

La pola kulturcentro en Munkeno la 8an de oktobro per malfermo de ekspozicio de junaj polaj artistinoj festis sian dekjaran ekziston. Inter pli ol cent gastoj, estis reprezentantoj de la bavara registaro kaj de la urbo Munkeno, kulturagantoj, artistoj kaj aŭtoroj, diplomatoj. La konsulino Grażyna Strzelecka salutis ankaŭ la reprezentanton de la Bavara Esperanto-Ligo, Fritz Hilpert, kaj menciis nian kunlaboron dum la lastaj du jaroj.

Muzikis profesoro Leszek Źądło.

Mi mallonge parolis kun junaj artistinoj, kiuj ekspoziciis en la kulturcentro, kaj kun d-ro Matthias Kneip (Deutsches Polen Institut) kiu antaŭnelonge revenis el Pollando, kie li vizitis la Zamenhof-Centron en Bjalistoko.

Fritz Hilpert

Konferenco de ĈEA

Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio okazis 24–26 sep 2010 en Poděbrady, konata banurbo, de kiu devenis la ĉeĥa reĝo Georgo de Poděbrady (1420–1471), kiu kiel unua proponis ligojn de eŭropaj nacioj, kvankam sensukcese. En sia knaba aĝo vizitadis la urbon Franz Kafka, kies avino loĝis ĉe la urba placo. Proksime de tiu loko troviĝas parko kun aleo Esperanto, kiun prizorgis Ladislav Fiala. Nun loĝas en la urbo la sekretario de ĈEA Pavel Polnický, la ĉefa organizanto de la konferenco.

Proksimume okdek da esperantistoj loĝis kaj konferencis en agrikultura lernejo kaj internulejo. La programo komenciĝis vendrede post vespermanĝo en aŭla salono per projekciado de reklamoj pri nove eldonitaj libroj de la eldonejo KAVA-PECH, kiujn ĉiu povis aĉeti aŭ almenaŭ trafolumi en la apuda ĉambro, kiu servis kiel kafejo kun libro-servo.

Al la ĉefa konferenca traktado estis dediĉita la sabata antaŭtagmezo en la salono, kie la asociaj komitatanoj prezentis siajn raportojn pri la agado de la asocio dum la pasinta jaro. Sekvis diskutoj de klubaj reprezentantoj. Ekzemple, la klubanoj de Mladá Boleslav anoncis sian intencojn prizorgi memortabulon por d-ro Josef Hradil (aŭtoro de medicina terminaro en Esperanto), por kies realigo ili kolektas monon. Post la tagmanĝo Pavel Polnický gvidis promenon tra la urbo, prezentis plej interesajn banurbajn vidindaĵojn. Je la 16a horo en la salono la konferencanoj konatiĝis kun la nova asocia retejo danke al projekciado sur granda ekrano.

La vesperan amuzon startigis loka vakermuzika danĝrupo de emeritoj (meza aĝo 70 jaroj), la tombolon jam tradicie gvidis humure Kvido Janík.

Dimanĉe antaŭtagmeze la konferenco diskutis pri Esperanto en la moderna mondo kaj pri planoj de ĈEA por la plej proksima tempo. Ekzemple, pri planoj de ekspozicioj en la Esperanto-muzeo en Svitavy, pri reta kontaktigo de ĉiuj kluboj kaj pri propono prezenti ilian laboron en la asocia retejo kaj pri projekto *Memoro de la ĉeĥa Esperanto-movado* k.s. Posttagmeze proksimume trideko da homoj forveturis buse al proksima vilaĝo Přerov nad Orlicí, kie ili trarigardis grandan skansenon.

Venontjare okazos asocia kongreso, tio signifas, ke estos elektita nova asocia komitato.

Miroslav Malovec



Esperanto ŝanĝas la mondon

La 97a Japana Esperanto-Kongreso okazis 9–11 okt en la urbo Nagasako en la suda insulo Kjuŝuu. Al ĝi aliĝis 396 homoj, el kiuj efektive partoprenis 191. La kongresa temo estis “Esperanto ŝanĝas la mondon, ankaŭ vin!”

Nagasako estas konata kiel la dua atombombita urbo post Hiroŝimo la 9an de aŭgusto 1945. En tiu katastrofo momente pereis pli ol 70000 homoj, kaj la vunditoj suferadas pro la radioaktiveco dum la postaj jaroj. Entute pli ol 140000 homoj mortis pro la atombombo.

Ek de la komenco de la 17a jarcento ĝis la mezo de la 19a jarcento Japanio estis fermata al la ekstera mondo kaj nur koreoj, ĉinoj kaj nederlandanoj estis permesitaj eniri en Japanion tra Nagasako. Tial en la urbo restas tiamaj memoraĵoj kaj loĝas multaj kristanoj. Nagasako estas tre unika turisma urbo en Japanio.

Ĝi ankaŭ estas la naskiĝurbo de la japana Esperanto-movado. Alphonse Mistler (1873–1953), franca pastro kaj instruisto, venis al Nagasako en 1893 kaj skribis pri Esperanto en la anglalingva gazeto *Nagasaki Press*. Li instruis Esperanton en la mezlernejo Kaisei, kie li laboris. Tio estis la unua instruado de Esperanto en Japanio.

En ĉi tiu kulturriĉa urbo Nagasako posttagmeze 9 okt komenciĝis kunsidoj: komencantoj, kristanoj, ekzameno, la 9a artikolo de la japana konstitucio (paca movado), santerapio, Azia agado, kaj kunsido por lokaj aktivuloj. En la salono estis librotutikoj, budoj de kelkaj Esperanto-societoj kaj sur la muro estis montritaj fotoj pri Francio kaj pacaj mesaĝoj kolektitaj okaze de la Azia kaj la Universala kongresoj. Multaj homoj amasiĝis tie por babili, butikumi kaj amikiĝi.

Sekvatage post la inaŭguro okazis kvin prelegoj: “Alphonse Mistler kaj lia epoko” fare de la ĉefdirektoro de la mezlernejo Kaisei, “Janagida Kunio en Ĝenevo” (Janagida estis estrarano de Japana Esperanto-Instituto kaj fama folkloristo), du prelegoj pri Ossaka Kenĵi (fondinto de JEI) fare de Ossaka-premitoj kaj “Gronlando” fare de Dieter Kleeman el Germanio. Paralele okazis kunsidoj de goo, budhanoj, Esperanto-Domo de Yatugatake, blinduloj, nova lernomaterialo kaj Delegito de UEA kaj Pasporta Servo, koruso, Esperanto-kurso por civitanoj, koncerto, kaj vespere bankedo.

Dum la lasta kongrestago okazis prelegoj “Nagasako kaj Esperanto” kaj “Budhana Esperanto-movado en Ĉinio” (Shi Yonggen), kunsidoj por komencantoj, brajlo, SAT, venonta kongreso, paca movado, sciencistoj kaj medicinistoj, koruso, JEI kaj nova ekzameno. En la fermo la prestiĝa Ossaka-premio estis donita al Oŝioka Taeko kaj Moritaka pro iliaj agadoj en kaj pri Hiroŝima, la premiojn de la literatura konkurso ricevis Aida Kijoŝi kaj Hori Jasuo, kaj fine la verda standardo estis transdonita al Kaŭaniŝi Tecuroo, ĉeforganizanto de la 98a Japana Kongreso, kiu okazos kune kun la 43a Korea Kongreso en la venonta oktobro proksime de Seulo.

Hori Yasuo



ARKONES XXVI

Post multaj jaroj la ARTaj KONfrontoj en ESperanto forlasis la lernejon *Ĉejery* apud la Citadelo de Poznano kaj translokiĝis al la Fervoja Kulturdomo, kie rezidas la klubo *E-Senco*, kaj kiun gvidas esperantisto Wiesław Libner. La ŝanĝo de la ejo finance savis la aranĝon, al kiu ĉi-jare venis ducento da personoj. La nova ejo havis nur unu mankon: ne estis la tre populara en *Ĉejery* manĝoĉambro, en kiu oni povis dum pluraj horoj konversacii kaj diskuti ĉe teo, kafo aŭ biero.

Ĉio cetera estis bonega: kelkaj ĉambroj por prelegoj, aparataro por projekcii bildojn, granda salono *Spegulejo* por koncertoj kaj aliaj amasaj aranĝoj, kaj eĉ samkonstruata hoteleto. Aldone: la urbocentra situo kaj, kiel kutime, belega aŭtuna vetero, kiu emigis multajn promeni en Poznano. Mi inklinas al la opinio (krakovanoj pardonu min), ke ĉi tiu urbo estas la plej bela en Pollando.

La tri tagoj (24-26 sep) havis riĉegan programon. kaŭzante plendojn pri neceso elekti inter samtempaj interesaj eroj. Nur la vesperaj aranĝoj malhavis alternativon, krom koridorumado, kompreneble. Entute kvardeko da prelegoj, koncertoj, prezentoj, diskutoj, spektakloj, konkursoj ktp konsistigis la programon. La kleriga kaj scienca nivelo estis ne kutime alta por esperantista renkontiĝo danke al tio, ke al la programo kontribuis profesoroj el la Interlingvistikaj Studoj ĉe la universitato UAM.

Laŭreatoj de la plebiscito – Bogdan Dembiec, Nina Pietuchowska, Mariusz Majewski – staras kun diplomoj inter Halina Komar kaj Marian Zdanowski (*Fotis Andrzej Sochacki*)



Kiel kutime, la organizantoj zorgis pri eminenta muzika programo. Fluto kaj gitaro — kune kaj solinstrumente, prelego-koncerto de Manuel Rovere, unika muzikluma spektaklo-koncerto de SoloTronik kun komuna kriado “Ar ko nes, Ar ko nes, Ar ko nes!!!” La nederlanda *Kapriol’!* dancigis en balfolka stilo, kiu signifas festan balon kun tradiciaj dancoj: parodancoj kiel skotiŝo aŭ polko, vicodancoj kaj rondodancoj. La grupo ne nur muzikis kaj kantis, sed ankaŭ instruis dancadon al dezirantoj.

Abundis ankaŭ la teatra programo. La neripetebla Jarlo Martelmonto prezentis sian novan scenejverkon. Prezentiĝis la kabareda grupo *La oraj pantalonoj en arbustoj* kaj Adam Chrupczak. Ivo Miesen aranĝis fotoekspozicion pri someraj aranĝoj kaj siaj vojaĝoj. Oni ne povas imagi ARKONESon sen kvizo de Marian Zdanowski. Dum la miel-vespero estis anoncita rezulto de la Tutpollanda Esperanto plebiscito en kvar kategorioj:

Amiko de Esperanto: Jerzy Szmajdziński;

Esperantisto de la Jaro: Nina Pietuchowska;

Loka E-aktivulo: Mariusz Majewski;

Pro la tuta E-agado: Bogdan Dembiec.

Dek kvin personoj, sukcese pasigitaj KER-ekzamenojn, ricevis diplomojn.

Multegajn fotojn pri ARKONES oni povas trovi en Facebook, Ipernity kaj en la retejo: <http://arkones.org/>

Halina Gorecka

UAM: sesio kaj instruista trejnado

Se vi ne nur deziras, ke Esperanto estu instruata en diversaj lernejoj, sed vi mem volas ankaŭ instrui, tiam finfaru la unujaran instruistan trejnadon de la universitato Adam Mickiewicz (UAM) kaj ILEI kunlabore kun Edukado.net! La kursaro jam la trian fojon akompanas la tradiciajn interlingvistikajn sesiojn en la UAM en Poznano (Pollando).

La du surlokaj unusemajnaj sesioj (septembre kaj februare) disponigas koncize la necesajn metodikajn konojn por profesie instrui Esperanton. Post hejma kaj reta laboro la sukcesa trapaso de la fina kompleksa ekzameno kun prezento de finlaboraĵo rajtigas al la instruista diplomo de ILEI post unu jaro.

La defion alfrontis ĉi-foje 11 personoj (po 3 el Pollando kaj Hungario, 2 el Francio, po unu el Slovakio, Belgio kaj Germanio). ILEI kun UEA disponigis kvar stipendiojn kiel en la pasinta jaro.

La motoro kaj gvidanto de la trejnado, Katalin Kováts, allogis la atenton de la partoprenantoj ĝis la lasta momento per verva prezento de instrumentodoj, instrufaktoroj disponigante amason da lernmaterialoj kaj trejnante la kursanojn pri la uzo de la retejo www.edukado.net. Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj traktis tiklajn terenojn de gramatiko kaj instruadon de fonetiko, gramatiko kaj vortoprovizio.

La aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj kompletigis la studprogramon: István Ertl skizis panoramon de la nuntempa Esperanto-literaturo. La partoprenantoj povis flari ankaŭ la unuafoje realiĝantan kurson pri tradukado — specialiĝon en la tria jaro de la interlingvistika programo: Kristin Tytgat, el la Brusela Universitato, enkondukis la interesiĝantojn en la sekretojn de interpretado kaj tradukado, István Ertl en beletran tradukadon.

Samtempe el la pasintjara grupo du partoprenantoj — Katarina Nosková el Slovakio kaj Xose Conde el Katalunio — prezentis sian finlaboraĵon kaj sukcese trapasis la finan ekzamenon.

La merkreda komuna vespero kaj semajnfine la kulturaj programoj de Arkones ofertis amuziĝon al la persistaj kursanoj. La kursanoj trovis la semajnon riĉa je programoj kaj informoj, sekvas nun la plenumo de taskoj kaj metieja kunlaboro pere de la interna diskutlisto.

Pripensu la partoprenon en la nova universitata grupo post unu jaro!

Ilona Koutny

Taguatinga: omaĝo al pioniro

19 sep la Taguatinga Esperanto-Klubo (TEK) okazigis la 13an Esperantan Renkontiĝon de Taguatinga (apudurbo de Braziljo, la ĉefurbo de Brazilo) kun la temo “Esperanto dum 50 jaroj en Braziljo — Nelson Pereira de Souza” por omaĝi ĉi tiun lokan Esperanto-pioniron.

Inter la 123 partoprenantoj estis Nina de Souza (la vidvino de Nelson Pereira de Souza), Arlete Sampaio (eks-vicurbestro de Braziljo), Gacy Simas el la Beletra Akademio de Taguatinga, Ari de Sousa Lima el la Framasona Loĝio “Lazaro Ludoviko Zamenhof”, Paulo César Pereira el Legio de la Bona Volo, Amélia Barbosa Pinheiro (direktoro de la lernejo “Lazaro Ludoviko Zamenhof”), Waldir Antônio Silvestre (prezidanto de Brazila Asocio de E-Spiritistoj) kaj aliaj eminentuloj.

En la renkontiĝejo TEK starigis ekspozicion, kiu montris sur paneloj la progreson de la ĉefurbo Braziljo kun fotoj pri la loka movado. Post la spektado de la videofilmo *Esperanto estas...* infanoj el la lernocentro Chico Xavier prezentis Esperanto-kanton pri Nelson. Ilin sekvis la ĉefa artisto — komponisto kaj repisto Tone.

Sekvis la pritema konferenco, gvidita de Eurípedes Alves Barbosa. Ĉi-jaran honoran diplomon de TEK ricevis la kantisto kaj komponisto Flávio Fonseca. Tone kantis pliajn rep-kanzonojn, lerte enkondukante ilin.

Carlos Maria, Evandro Avellar

KER: Brazilo plej supre

Kadre de la 5a Esperanto-Kongreso de la ŝtato San-Paŭlo en la urbo Piracicabo la 11an de oktobro 32 kandidatoj dum kelkaj horoj en aparta ĉambro ŝvitadis super la UEA-ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).

La ekzamenado estis organizita danke al Katalin Kováts, redaktoro de www.edukado.net kaj gvidanto de la ekzamenkomisiono de UEA. Ŝia agado, kvankam virtuala kaj interreta, instigis al realaj kaj praktikaj rezultoj surloke. Edukado.net zorgis interalie pri trovo de monrimedoj por kompletigi la ekzamenan kason en Brazilo kaj la Brazila ILEI-Sekcio stipendiis ses kandidatojn.

Post ĉi tiu sesio Brazilo kun 51 ekzamenitoj staras sur la pinto de la monda KER-statistiko, sekvate de Francio (32), Pollando (28) kaj Germanio (26).

Jose R. Tenorio



Tone kantas en Taguatinga

Angers: Esperanto por la paco

En la franca urbo Angers ekzistas “Place de la Paix” (Placo de la Paco) kun monumento pri paco. Antaŭ dek jaroj la asocio Mouvement de la Paix (Pac-Movado) iniciatis aranĝi sur tiu placo la 21an de septembro oficialan paco-tagon de UN. Al tiu projekto iom-post-iom aliĝis aliaj asocioj, kaj en 2008 ankaŭ la Esperanto-grupo de Angers aliĝis al la asociaro, kiu alprenis la nomon “Collectif du 21 septembre” (Asociaro de la 21-a de septembro). La grupo partoprenis la porpacan programon ankaŭ ĉi-jare.

13 sep. Kelkaj samideanoj ĉeestis ceremonieton ĉe la urbodomo, kie post paroladetoj oni pendigis gigantan ĉiel-arkan pac-flagon faritan el pli ol mil infanaj desegnoj pri paco.

15 sep. Mireille Grosjean, veninta el Svislando, prezentis 600 fotojn pri ĉiutaga Japanio al esperantista publiko.

16 sep. En eks-soldatejo Mireille Grosjean prelegis pri “Pacdukado. Spertoj pri instruado de konfliktoŝolvido” kaj respondis demandojn de ĉeestantoj.

21 sep. La vizitantoj de la Paco-placeto povis divers-maniere konatiĝi kun Esperanto. Unue, la inaŭgura paroladeto estis legata france kaj Esperante. Due, sur la placeto inter du arboj pendis pac-mesaĝoj senditaj al ni de la virin-asociaro el Hiroŝimo. Trie, inter tabletoj de “Collectif du 21 septembre” estis ankaŭ ekspozicia tableto de la Esperanto-grupo, kun kajero por kolekti pac-mesaĝojn, kiujn oni sendos al Hiroŝimo.

26 sep. Esperanto estis prezentita en la kvartala centro “Maison de quartier St-Serge” dum kvaronhoro, inter prezentadoj de aliaj asocioj. Poste okazis diversaj atelieroj, en kiuj ankaŭ Esperanto ludis rolon.

Laurent Vignaud

“Amikeco” — 50-jara!

17–19 sep 2010 en Česká Třebová oni festis la 50-jariĝon de la urba Esperanto-rondeto *Amikeco*.

La festado komenciĝis per la seminario “La rolo de Esperanto en la moderna mondo”, kiun vizitis 80 partoprenantoj el Ĉeĥio kaj aliaj landoj. Prelegantoj parolis pri la historio de Esperanto, pri ĝia nuntempa rolo, pri ĝia uzado en la fervoja medio, pri la aplikado de la faka terminologio kaj pri la historio de *Amikeco*. Por neesperantistoj la prelegoj estis tradukataj en la ĉeĥan lingvon. Je fino de la seminario okazis komuna vespermanĝo kaj babilado en la kafejo *Esperanto*, dum kiu regis vere amika etoso.

En septembro 1960 Jiří Pištora kun grupeto da interesatoj, fondis la E-rondeton *Amikeco*. Baldaŭ aliĝis unuopuloj, sciantaj la lingvon kaj venis interesatoj pri la lingvo. Multaj ellernis ĝin kaj eklaboris por ĝia disvastigado. La rondeto funkciis ĉe la uzina klubo de fervojistoj. La rondeto prosperis, ĝiaj anoj vizitadis diversajn kongresojn. Esperantaj baloj por nefumantoj estis tre ŝatataj de la civitanoj.

Kiam Pištora fariĝis direktoro de la urba muzeo, li fondis en ĝi Esperantofakon. Nun lian laboron daŭrigas samideanoj el urbo Svitavy, kie en 2008 estis inaŭgurita Esperanto-muzeo.

18 sep renkontiĝis 115 homoj en la urba parko Javorka por la malkovro de la memorŝtono, okaze de la 50-a jubileo de la Esperanto-rondeto. La ŝtono staras sub la Esperanta arbo tilio. Poste la partoprenantoj venis al la restoracio *Na Horách* por ĉampana tosto kaj tagmanĝo.

La suna vetero ebligis malgrandan promenon en ĉirkaŭaj arbaroj. En la malgranda kapeleto de la Virgulino Maria Helpanta estis komune kantita speciala Maria kanto, konata nur ĉi tie.

Dum posttagmeza programo kvar ĝis nun vivantaj fondintoj de la rondeto kaj pluaj eminentuloj estis honoritaj per belaj diplomoj kaj floroj. Fine sekvis filmeto ekde la komencaj tempoj de la laboro en la rondeto. Organizantoj ne forgesis ankaŭ la forpasintojn. Iliaj tomboj estis ornamitaj per floroj kaj kandeloj.

Dum la dimanĉa antaŭtagmezo okazis komputila kurso. Aliaj gastoj trarigardis la urbon. Alilandanoj restis dum kelkaj pliaj tagoj.

Jana Křížková, Ladislav Kovář

Unufraze

★ D-ino Meg Bianchi nome de Kultura Centro E-ista reprezentis Eon en la tradicia septembra sesio de la laborgrupoj de la Asocio de Lingvotestistoj Eŭropaj fine de septembro en Frankfurto-ĉe-Majno. (HeKo)

★ En la nova 14-minuta filmo *Senmova* de la turka reĝisorino Tuğçe Madayanti Sen temas pri du infanaĝaj amikinoj, la politike aktiva Ismene k la nepolitika k naiva Effie en totalisma reĝimo en nedifinita tempo, kie oni parolas Eon. (UEA-membroj)

★ 15 sep premieris en Svislando la elektropopa ĉambro-opero *Three* de la grupo UMS ‘n JIP, kiu priskribas ĝin: “la utopio de komuna eŭropa lingvo bazita sur Esperanto estas lude kaj muzike traktata”. (UEA-membroj)

★ Nov-Skotia E-grupo starigis sian propran tablon 26 sep en la ĉiujara, unutaga librofiro “Word on the Street” en Halifaxo, Kanado. (Landa Agado)

★ Danke al instruvojaĝo de Heidi Goes, 3 okt estis fondita E-klubo *Esperiga Suno* en Ĝakarto, kies unua prezidanto estas Abdul Harris; ĝi estas la unua E-klubo starigita en Indonezio ĉi-jarcente. (UEA-membroj)

★ Ampleksa incendio detruis grandan parton de la teritorio de *Bona Espero*, esperantista orfejo en Brazilo; la granda grundofajro trafis la regionon en la tria semajno de septembro. (Ret-Info)

★ Danke al pli ol 32 mil eŭroj, donacitaj de deko da grandaj sponsoroj (de 500 ĝis 3.000 eŭroj) k 215 individuoj (de 1 ĝis 499 eŭroj), estis komplete rekonstruita la instruista retejo Edukado.net, fondita de Katalin Kováts en 2001 por subteni k helpi E-instruantojn. (Libera Folio)

★ Je 22 okt 2010 al la 96a UK okazonta 23-30 jul 2011 en Kopenhago aliĝis 200 personoj el 39 landoj, plej multe el Nederlando 24, Danlando 22, Japanio 16, Germanio 13, Francio 11, Brazilo 10. (uea.org)

★ Kadre de la 18a Internacia E-Semajno de Kulturo kaj Turismo (2-9 okt 2010, en Coma-Ruga, Katalunio) la premio Ada Fighiera-Sikorska estis aljuĝita al Rafaela Urueña. (Luis Serrano Pérez)

★ En 2009 Norvega E-Asocio havis 184 membrojn, je 12 malpli ol en 2008; inter ili 72 estas en Oslo. (*Norvega Esperantisto*)

★ La Administra Komitato de LF-koop nomumis senatanon Dieter Rooke vicdaktoro de *Heroldo de Esperanto*. (HeKo)

JES! Por la dua fojo

Atendas nin la dua Junulara Esperanto-Semajno. Post kiam pasintjare pli ol ducent junaj homoj festis la jarŝanĝon en la suda Pollando, piede de la Tatroj, en Zakopane, ni ĉi-jare bonvenigas vin en la orient-germana urbeto Burg.

Burg troviĝas en la belega biosferrezervejo Spreewald (arbaro ĉe la rivero Spree), fama pro siaj multegaj grandaj kaj malgrandaj riveretoj. La belega pejzaĝo de la Spreewald originas de la glaciepoko kaj danke al tio nun ekzistas tre vasta reto de pli ol 450 riveretoj. En la regiono de Burg troviĝas multaj sanigaj fontoj kies akvo estas uzata en diversaj banejoj kaj naĝejoj.

Vintre, kiam la riveretoj estas glaciigintaj, multaj homoj prenas siajn glitŝuojn kaj promenadas sur la multaj riveretoj tra Spreewald. En Burg estas haveno por kanotoj — dum vintro okazas specialaj kanotveturadoj.

La loko estas tre interesa ankaŭ pro la regiona minoritato, la soraboj. En Burg oni povas malkovri la malfacilan pasintecon de la soraboj, kiuj pro politikaj kialoj devis asimiliĝi kaj germaniĝi. Sed la soraboj sukcesis konservi kaj daŭrigi siajn tradiciojn kaj vivmanieron.

Kadre de nia temo “Estinteco, estanteo, estonteco” okazos multaj diversaj programoj. Dum vesperoj okazos pluraj koncertoj. Certe ne mankos Kimo, el la grupo *Hotel Desperado*, kiu prezentos novajn kantojn en JES. Koncertos ankaŭ repisto Platano kun surprizaj gastoj kaj pianisto Gijom. Muzikan programon pliriĉigos kelkaj germanaj bandoj: *The ModStreets*, 42 kaj *The Heroine Whores*. Komprenoble vespera programo signifas ne nur koncertojn. Okazos kviza vespero de Rolf Fantom kaj la konkurso “La Supertalento”.

Tiu kiu partoprenis la unuan JES, scias pri kio temas: Renkonti geamikojn, kiujn oni normale ne vidas, kaj kune vivi dum unu semajno en la eksterordinara Esperanto-mondo! Kaj, tiu kiu maltrafis la unuan JES, nepre devus kapti la ĉi-jaran okazon.

Pliaj informoj: <http://jes.pej.pl>

Lukasz Żebrowski



MKR revenis al Aŭstraj Alpoj

30 sep – 3 okt naturemaj esperantistoj renkontiĝis en la 21a MKR (Mont-Kabana Renkontiĝo). Post 11 jaroj en Kroatio kaj Slovenio, ĉi-jare MKR revenis al sia naskiĝlando, Aŭstrio.

Ĉi-foje 24 montmigremulojn el 4 landoj gastigis la konata feriurbeto Reichenau en Malsupra Aŭstrio, kaj tiu loko donis la eblecon viziti du plej orientajn montojn el Alpa ĉeno: Raxalpe kaj Schneeberg (Neĝa monto). Kiel MKR-ejo servis pensiono *Flackl Wirt*.

La unua tago estis dediĉita al vizito de Raxalpe kaj ĝia plej alta pinto Heukuppe (2007 m). La ekskurso ne estis tro laciga kaj eĉ infanoj povis senprobleme atingi la pinton. Kaj la vetero donis al ĉiuj eblecon vidi la unuan neĝon.

La duan tagon oni uzis por Schneeberg — ĉiuj vizitis la interesan kanjonetan Weichtal kaj montkabanon Kienthalerhütte, kaj grupo de plejfortuloj surgrimpis la plej altan pinton de Schneeberg (Klosterwappen, 2076 m).

Ĉiuj partoprenantoj konkludis, ke MKR tre sukcese revenis al Aŭstrio, kaj pluraj esprimis sian deziron ke ankaŭ venonta MKR okazu ie en Aŭstrio. Tamen, la loko de 22a MKR en la 2011a jaro estas ankoraŭ nekonata kaj la decido pri ĝi okazos dum ĉi aŭtuno kaj vintro.

Vanja Radovanović

Esperanto-Kulturtago 2010

2 okt 2010 ĉirkaŭ tridek esperantistoj renkontiĝis okaze de la 2a Esperanto-Kulturtago 2010 de Esperanto-Ligo de Malsupra Saksujo (EMAS) en la restoracio *Ding Feng* en Hanovro.

En la programo estis la jarkunveno de EMAS (ĉi-foje sen elektoj), librotablo, kaj kvar interesaj prelegoj. D-ro Markus Beckmann klarigis principojn, eblojn kaj limojn de homeopatio. Hans Welling informis pri la projekto SETI (Serĉado je Ekster-Teraj Inteligentuloj). Li rakontis detale, kiel li antaŭ iom pli ol dek jaroj dum kontrolado, ĉu lia komputilo povus esti trafata de la jaro-2000-problemo, pli-malpli hazarde iĝis trovinta! Kaj tial li eksciis, ke la fina venko de Esperanto estos okazinta plej malfrue en 2049... Harald Schicke raportis pri sia prelegvojaĝo tra Norda Koreujo pri naturkuracado. Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar prelegis pri la EU-projektoj Comenius, Grundtvig kaj Vielfalt, kiujn ellaboris kune kun aliaj institucioj la Interkultura Centro Herzberg.

Andreas Kueck

La franca malpli uzata

Dafydd ab Iago el Bruselo

Komence la franca estis lingvo potenca kaj diplomata. Estis memkomprenebla uzi kaj esti devigata uzi la francan kiel komunikilon en la Eŭropaj institucioj. Tamen en la lasta jardeko la franca suferas atakon rilate al sia uzado ene de la institucioj de la Eŭropa Unio.

En 2009 nur 8.32% de ĉiuj dokumentoj, tradukitaj en la Komisiona tradukservo, estis originale francaj. Preskaŭ 75% de ĉiuj dokumentoj, tradukitaj de la Komisiono, estis skribitaj angle. En la germana, la tria “procedura lingvo”, estis skribita nur sensignifa (2.74%) parto de la tradukitaj dokumentoj.

La statistiko montras la malplialtiĝon de la uzado de la franca. En 1997 la angla estis la fontlingvo por 45% da dokumentoj, kaj la franca havis la honoran nombron 41%, kaj lingvo de Goethe kaj Schiller nur 5%. Eĉ en 2000 la franca estis signife reprezentata kiel procedura lingvo en la Komisiono: tiam 32% de ĉiuj dokumentoj estis originale francalingvaj, kaj 26% en 2004 — la jaro kiam deko da novaj centreŭropaj landoj aliĝis al la Eŭropa Unio. Sed post du jaroj, en 2006, la parto de la franca abrupte reduktiĝis ĝis 14%. En 2008 inter 1.8 milionoj da paĝoj tradukitaj, nur 12% havis la francan kiel la fontlingvon (72% la



Prezidento Sarkozy puŝis la francan en Bruselo, sed vane. (Wikimedia Commons)

anglan, 3% la germanan, kaj 13% aliajn lingvojn). La nombrojn por 2009 vidu en la komenco de la artikolo.

Komparu mem: 41% en 1997 kaj 8,32% en 2010. Jen la lingva efiko de la pligrandiĝo de la Eŭropa Unio. En 2004 kaj 2007 aldoniĝis dek du novaj lingvoj, kaj, kune kun la irlanda oficialigita en 2005, en EU nun estas 23 oficialaj lingvoj. Preskaŭ ĉiuj novaj oficistoj el la centra kaj suda Eŭropo, nek pretas, nek povas lerni unu plian fremdan lingvon

samnivele kiel la anglan. Kaj eĉ se ili volas, la daŭra kaj ĉiutaga uzado de la angla, kiel la “komuna” lingvo ene de la Eŭropaj institucioj, lasas al ili nek spacon nek tempon lerni la francan.

Spite al la evidenta malgraveco de la 22 aliaj lingvoj, la Eŭropa Komisiono deklaras, ke ĝi egale traktas siajn 23 oficialajn lingvojn. Ĝi ankaŭ insistas pri la fakto, ke estas apogataj pli ol 60 indiĝenaj Eŭropaj lingvoj. Oficistoj klarigas, ke la lingva politiko estas evoluigata por respekti la lingvan diversecon kaj por promocii multlingvismon.

Tiaj asertoj ne konvinkas la francan ĵurnaliston Jean Quatremer. Li certas, ke neanglaj parolantoj estas malfavorataj. Li kritikas la fakton ke la gazetara servo de la Komisiono favorigas la anglan, kaj ke departementoj financaj kaj ekonomiaj funkcias nur angle.

“Malgraŭ tio, ke la Eŭropa Centra Banko havas sidejon en Frankfurto kaj ĝia prezidanto estas franco Jean-Claude Trichet, ĝi laboras nur angle, eĉ se Britio ne estas membro de la eŭro-zono”, — atentigas Quatremer. “Ĉi tiu unulingvismo donas grandegan privilegion al anglalingvaj amaskomunikiloj, kiuj disponas je konkurenca avantaĝo senprecedenca, kaj, ankaŭ al denaskaj parolantoj de la angla. Fine novzelandano aŭ aŭstraliano ricevos laboron en la Eŭropaj institucioj pli facile ol hispano, polo aŭ franco”, — konkludas la ĵurnalisto.

Nekutima propagando de Esperanto

(Ret-Info) La hungaria nutraĵvendeja ĉeno *Spar* anoncis konkurson, en kiu oni povis gajni diversajn premiojn, se ili alsendas etiketojn de mineralakvaj boteloj de speco *Verde*.

Faris tion ankaŭ Ódor György, esperantisto el Zalaegerszeg, kaj danke al bona fortuno li gajnis la ĉefpremion, aŭtomobilon *Fiat Punto*. Dum la premiado, kaj dum la fotado li portis T-ĉemizon kun okulfrapa surskribo *Esperanto*, do tiu vorto nun aperas en bone legebla formo sur milionoj da etiketoj de la mineralakvaj boteloj *Verde*.

László Szilvási



Kubo: Postkongresa aktivado

25 sep en la nacia sidejo de la Kuba Esperanto-Asocio okazis festa aranĝo kun la helpantoj, kiuj entuziasme kunlaboris por sukceso de la 95a UK, la 43a ILEI-konferenco, la 66a IJK kaj la 41a IIK. Dum la ceremonio oni transdonis atestojn pro la kontribuo al proksimume 50 partoprenantoj.

Meze de septembro komenciĝis novaj kursoj en la nacia sidejo kaj en la Havana sidejo por proksimume 50 kursanoj. Entute oni taksas, ke tra la lando pli ol cent novaj kursanoj eklernas Esperanton. Krome rekomenciĝis kurso por progresintoj, kurso por trejnado de instruantoj kaj por preparado de interpretistoj-tradukistoj.

Por la unua fojo kunlabore kun la kuba bahaa asocio komenciĝis kurso de Esperanto en la havana sidejo. Funkcias ankaŭ kurso kunlabore kun la kuba asocio de blinduloj, kiuj dum la UK akceptis grupon de blinduloj.

KEA-prezidanto Julian Hernández esprimis sian kontenton pri la sekvoj de la UK kaj ties informa flanko kaj invitis ĉiujn daŭre labori por teni la movadon same vigla.

Oni jam invitas la homojn aliĝi al la tradicia Zamenhofmetiejo okazonta decembre en la provinco Guantánamo.

Maritza Gutiérrez

Ne forgesu (re)aboni

Subtekstigo de film(et)oj

Subtekstoj (aŭ: subtitoloj) estas tekstoj akompanantaj projekciatan filmon kiuj helpas al ĝia kompreno. En certaj landoj, kie ne ekzistas tradicio de dublado (anstataŭigo de la originalaj voĉoj per tradukaĵo), tio estas la kutima maniero prezenti fremdlingvan videomaterialon. Ĉar dublado estas tre kosta kaj postulas profesiecon, tio ankaŭ estas la tipa solvo por amatora tradukado, inkluzive de plej multaj esperantigoj. Esperantigitaj filmoj diskonigas nacilingvajn kulturojn kaj amaso da filmetoj en la interreto estas de unuopuloj subtekstigitaj Esperanten kaj libere spektebla por amuzo aŭ kiel instruilo.

Verda Filmejo <filmoj.net> estas hodiaŭ la plej ampleksa retejo pri filmoj en Esperanto. Iniciatita de REJM kaj estrata de la juna ruso Aleksander Osincev, ĝi montras jam pli ol 100 kontribuojn pri la Esperanta filmoarto, ofte akompanatajn per ligilo al esperantigo de la filmo kaj senpage spektebla antaŭfilmeto. Ligado al pirataj elŝutejoj de filmoj estas polemikata ero de ĝi. Sed la aŭtoro ankaŭ starigas oficialajn rilatojn kun produktistoj kaj jam sukcesis enigi Esperanton en la oficialan eldonon de kelkaj filmoj. La retejo enhavas ankaŭ videokursejojn pri subtekstigado kaj kunlaborantojn pri tradukado kaj provlegado estas daŭre serĉataj, foje eĉ salajrataj.

La dissendolisto **Subtitoloj / Subtekstoj** ĉe *Yahoo! Groups* <groups.yahoo.com/group/subtitoloj> estas la plej aktiva diskutejo pri esperantigo de filmoj, kun 173 membroj kaj 678 mesaĝoj en la arĥivo. Membrigi rajtas ĉiu ajn.

YouTube <youtube.com> estas la plej konata reta stokejo kaj spektejo de filmetoj maksimume 10-minutaj. Per la ŝlosilvorto “Esperanto” tie troveblas pli ol 5.000 filmetoj, ekzemple raportoj pri aranĝoj, prezentoj de Esperanto-muziko aŭ nacilingva varbado, sed ankaŭ Esperante dublitaj aŭ subtekstigitaj filmetoj. Ĉiu povas libere alŝuti novan filmeton, kaj ekz. E@I disponigas tie sian filmon *Esperanto estas* (ankaŭ la nacilingvajn tradukojn), jam tie spektitan pli ol 100.000-foje.

dotSUB <dotsub.com> estas stokejo de filmetoj kiu ebligas ilian facilan subtekstigadon. Unu persono alŝutas filmon, alia povas transskribi la originalan voĉon en subtekstojn, kaj pliaj traduki ilin en diversajn lingvojn. Hodiaŭ ĝi enhavas pli ol 300 videojn en Esperanto.

Overstream <overstream.net> estas ilo por aldoni subtekstojn al filmetoj jam troviĝantaj en YouTube, Vimeo.com, MySpace kaj aliaj stokejoj. Per eta truko, la kreitaj subtekstoj

29 aŭg 2010 en Katmanduo forpasis

Satyendra Bandopadhyaya (1923–2010)

instruisto de matematiko; simpatiano de Esperanto ekde la junaĝo sed aktiva esperantisto nur ekde 2001, aktiva propagandisto, fondinto-prezidanto de Orient-Nepala Esperanto-Societo.

17 sep 2010 en Mannedorf forpasis

d-ro Arthur Baur (1915–2010)

ĵurnalisto kaj membro de la Svislanda Unesko-komisiono. Esperantisto ekde 1930, li dum sia longa vivo prezidis Svisan Esperanto-Societon kaj redaktis ties organon, dum pli ol 40 jaroj gvidis la Esperanto-elsendojn de Svisa Radio Internacia, prizorgis la gazetarajn servojn en tri UKoj (en 1939, 1947, 1979), verkis plurajn librojn, interalie, la popularan *La fenomeno Svislando* (1979), redaktis la *Svisan Antologion* (1939). Honora membro de UEA ekde 1980.

Ni funebras kaj kondolencas.

La Ponto (beta)

Bonvenon, blahma | [Elsaluti](#)

The Matrix (La Matrigo) (93.65% preta)

Angla Esperanto

Subtitoloj tradukitaj kun meza fido

Por traduki, plenigu la tekstampon. Vi nur devas traduki la negrigitan tekston.

Se vi bezonas montri pliajn tekstojn kaj antaŭ kaj post la negrigitan subtitolon, klaku [plan kuntekston](#).

[Alia subtitolo](#) [Reen al The Matrix \(La Matrigo\)](#) [Mia konto](#) [Miaj mesaĝoj](#) [Miaj preferoj](#)

Traduku nur la negrigitan tekston:

547 Iri... (1 ĝis 1363) Rapida serĉo

545. I know kung fu. Show me.	Mi scipovas Kungfuon. Montru al mi.
546. This is a sparring program... similar to the programmed reality of the Matrix.	Tio ĉi estas luktatrenprogramo... simila al la programita realaĵo de la Matrigo.
547. It has the same basic rules. Like gravity.	Ĝi havas la samajn bazajn regulojn. Kiejn gravito.

[Plan kuntekston](#)

aperas super la originala videobildo kaj jam ekzistas 180 tiaj surskriboj en Esperanto — laste, ekzemple, de E@I por la ĉeĥa video *Facebook vs. realeco*.

La Ponto <laponto.esperanto.org.ar> estas unika reta ilo por komunuma tradukado de filmaj subtekstoj. Iniciatita ĝin argentinaj esperantistoj, kaj kvankam ĝi nun ŝajnas ne plu prizorgata, plurfoje oni ĝin sukcese uzis kaj nun estas tie (ek)esperantigitaj 74 filmoj.

Kiel spektilo de videoj rekomendindas la plursistema programo **VLC media player** <videolan.org>, kun bona subteno de diversaj formatoj kaj unikodaj subtekstoj. Iom eksmoda **BS Player** <bsplayer.org> disponas Esperanto-interfacon.

Subtekstoj utiligeblas ankaŭ por tute “seriozaj” celoj: La populara usona konferenco **TED** <ted.com> kies 18-minutaj prelegoj de famuloj sub la frapfrazo “ideoj disvastigindaj” estas oficiale libere spekteblaj en la reto instigas volontulojn multlingvigi la videojn per subtekstigado. El la 802 prelegoj, nur 19 estas nun tradukitaj en Esperanton (sed preskaŭ ĉiuj en la ĉinan!). Stimulo de ĉi tiu agado estos programero de la scienca Esperanto-konferenco KAEST, okazonta novembre en Slovakio.

Marek Blahuš

Leterkesto

Gratulon al *La Ondo* kaj al la aŭtoro István Ertl pro la tre interesa artikolo *La elpelata nacio* (oktobro 2010). Tiu artikolo ne nur ĝustigas la fantaziaĵojn de G. Silfer en apuda artikolo, sed pritraktas sobre kaj profunde tre zorgigan situacion en Francujo kaj Eŭropo. Oni ne kutimas legi tiajn artikolojn en *La Ondo*, sed la eventoj eble devigos esperantistojn trakti la homrajtan temon en siaj periodaĵoj. Ĉiuokaze, dankon pro tiu artikolo!

Jeanne-Marie Cash (Francio)

Post tralego de la libro *Dek gazetoj* mi volas skribi, ke *El Popola Ĉinio* en Esperanto lasis al mi elstaran impreson. Agraĵaj estis la legado, interkomunikigo, etaj donacetoj. Memorante pri EPĈ, ĉi-jare mi abonis la ruslingvan revuon *Kitaj* (Ĉinio), kiu aperas en kelkaj lingvoj. Kiu ŝatis rubrikojn en EPĈ, povas trovi similajn en la revuo *Ĉinio*: “El la vivo”, “Speciala temo”, “Fotoreportaĵo”, “Socio”, “Kulturo”, “Vojaĝoj”, “Ĉina medicino”, “Kulinara notlibro”, miaj jam ŝatataj: “Legendoj kaj mitoj”, “Gusto al vivo” k.m.a. Malĝojigas, ke nun ni ne havas EPĈ-on, sed, povas esti, tia anstataŭaĵo al iu ŝajnos interesa.

Svetlana Konjašova (Ruslando)

En la 10a numero de *La Ondo* estis artikoleto pri KELI-kongreso en Hungario, kiun skribis kasisto de KELI, germano Siegfried Krüger. Mi ne verkis ĝin, sed nur sendis ĝin al vi kaj ne rimarkis, ke ne estas skribita la aŭtoro.

Pavel Polnický (Ĉeĥio)

Muta naturo

Studaĵo de Sergio Pokrovskij

Demando

Kiel nomi en Esperanto la pentrartan ĝenron kiu konsistas en prezentado de nevivaj objektoj? La ĝenron kies specimenojn oni trovas jam en la antikvaj civilizoj; ekzistantan kaj okcidente, kaj oriente; kaj kiun, en la tradicio okcidenta, tiom influis la pentristoj nederlandaj? Kiel konvenas, ni komencu per PIV.

La respondo de PIV

PIV difinas ion similan en la 4^a ekzemplo pri la 6^a senco de la vorto *natur*o (kursive aperas ekzemploj, kiujn mi numeris por oportuni referencadon):

* **natur/o** (...) 6 Objekto de la arto, kontraste kun la artaĵoj:

1. *pentri, desegni laŭ la naturo* (ne laŭ la fantazio);
2. *figuroj pli grandaj ol laŭ la naturo*;
3. *reveni al la pura naturo*;
4. *muta naturo* [Kalocsay] (fruktoj, mortintaj bestoj, ktp kiel objektoj de pentrado)

La ekzemploj ilustras iom malsamajn sencojn¹, tamen almenaŭ (1) kaj (2) prezentas *naturon* estkiel prototipon rilate al bildo; kaj supozeble ĝuste tiun kontrastigon celas la iom neklara difino.

Laŭ la difino de PIV, se trakti ĝin serioze, malnova bildo prezentanta persikojn ne estas *muta naturo*. Tiun lastan (t.e. la realajn fruktojn) oni jam delonge formanĝis.

Tamen apenaŭ la aŭtoroj pripensis tiun difinon serioze; pli probable, ke ili destinis la terminon por la signifo rekte kontraŭa al la de ili difinita (t.e. por indiki la bildon, ne ties prototipajn aĵojn).

La naturisma grundo

Tutcerte surbaze de la esperanta materialo normala esperantisto neniam inventus por la koncerna signifo la strangan terminon *muta naturo*; evidente, la kaloĉaĵa kombinas la difektojn de misterminoj nacilingvaj. Kaj apenaŭ naiva esperantisto, en kies kultura tradicio tiaj misterminoj ne ekzistas, divenos la celatan signifon.

La adjektivo *muta* estas ŝuldata al la

tradicio ĝermana: la nederlanda *stil-leven* (1650), kiun paŭsis la germana *Stilleben*, la angla *still-life*. Ĝi respondas al “kvieta, silenta, senmova”; iam ankaŭ al *malviva* (la angla *still-born*, malvive naskita).

La dua parto ĝermana normale signifas *vivo*, tamen ĉi-okaze ĝi respondas al la ĉi-supra difino de *natur*o; kp la germanan

Lebensgröße = natura granda

Sed eblas ke la nederlanda *leven* signifis *ekzistado* (*Dasein*), kio estus iom malpli stranga, sed apenaŭ pli trafa.

La sumo estas amuza duobla oksimoro: oni parolas pri *vivo* celante objektojn senvivajn; kaj krome, oni celas ne la objektojn mem, sed ilian bildon.

Surbaze de ĉi tiu epiteto CEED² tradukas *still life* per *senmovaĵo*; simile, la terminoj ĉeĥa *zátiší* kaj la slovaka *zátišie* proprasence signifas “kvietiĝo, silentiĝo, kvieta loko” (kp la rusan *затишье*).

La franca *nature morte*, “malviva naturo”, aperis (1752) kiel raciigo de la sama esence fuŝa esprimmaniero ĝermana. La epiteto iĝis pli trafa; sed la konfuzo inter bildo kaj prototipo konserviĝis kaj eĉ akriĝis.


Termino netradukinda

Pluraj lingvoj akceptis tradukpruntan el la germana; ekz-e la gepatra lingvo de Kalocsay uzas la terminon *csendélet* (*csend* = silento, *élet* = vivo, ekzisto).

Multaj lingvoj akceptis tradukpruntan el la franca: la pola *martwa natura*, la itala *natura morta*.

Pluraj lingvoj adoptis fonetikan transskribon de la termino franca kiel simplan, neanalizeblan vorton unuradik: la rusa-bulgara *натюрморт*, la turka *natürmort*, la litova *natiurmortas* ktp. Oni eĉ speciale emfazis la franc-econ per la vokalo *ю, ŭ, iu* responde al la franca *u*, diferencigante ĝin disde la latindevena pruntvorto *natura*.

Ĉi tiu tria solvo estas la plej racia: ĝi donas la internaciecon de la sonformo, sen difekti la pruntantan lingvon per



misa memklarigo. Ja la traduko neniam helpus kompreni: en la lingvoj uzantaj tradukpruntan oni komprenas ne danke al la traduko, sed malgraŭ la traduko³. Krome, ruslingve kaj *malviva naturo*, kaj *kvieta vivo* (kaj *muta naturo*) restas libere kombinitaj esprimoj, uzeblaj (kaj uzataj) rektasence.

Tia unubloka prunto povas prezenti avantaĝon eĉ kiam la originala formo estas derivaĵo sencohava. Ekz-e la franca *pays-âge* kaj la germana *Land-schaft* estas formitaj tute racie, kaj principe ne maleblus ilin paŭsi per *land-aĵo*; tamen *pejzaĝo* ja estas pli oportuna kaj pli preciza (ĉar *landaĵo* povus krome havi multajn aliajn signifojn, kiajn cetere havas *Landschaft* en la germana⁴).

Ankaŭ la ĉi-supre menciita traduko per *senmovaĵo* ilustras danĝeron pri alisensa interpreteblo de la paŭsaĵoj. Per si mem ĝi neniel pensigus ruslingvanon pri pentrarto; sed eventuale ĝi povus pensigi pri *недвижимость* (= *immobilier*, nemoveblaĵo, *real estate*).

La “muta naturo”

Bedaŭrinde, Esperanto estas tro latinida, kaj tial la racia solvo rusa-turka al ĝi ne aplikeblas: *naturmorte* ne aspektas tiom unuradika, kiel *pejzaĝo*⁵. Principe, eblus prunti el la nederlanda; sed *stilevo* min ial ne entuziasmigas.

La solvo kaloĉaĵa estas perversa, sed tiu perversaĵo havas sian spriton. El du misterminoj, *senmova vivo* kaj *malviva naturo*, li faris hibridon *silenta naturo*, kiun la ĝermanoj rekonu pro la senmovo/silento, kaj la latiniduloj pro la *natur*o. Ambaŭ rekoniloj estas neraciaj kaj fremdaj al la celata signifo, ambaŭ estas pecoj de maltrafa idiomaĵo nacilingva; sed ili funkcias por tiuj en kies menson tia idiomaĵo estas enkonstruita.

Verdire, tiu ĥimero estas iom pli malbona ol la mistermino franca (ĉar *malviva* estas la sola ĝusta karakterizaĵo, dum *silento* estas maltrafa).

Kaj supozeble por proksimigi la sonformojn, Kalocsay anstataŭigis la hungaran *silenton* (kiu jam hungare deviis de la senco ĝermana) per ankoraŭ pli devia *muta*, kiu tamen sonas tre simile al la franca *morta*; kp

nature morte
naturo muta

Nu, la kalemburo perdiĝas en la kutima vortaranĝo “muta naturo”.

Resume, *muta naturo* probable povas kontentigi tiujn, kiuj serĉas eksteran solvon surbaze de la okcidentaj idiomaĵoj; ĝi estas maltaŭga por tiuj, kiuj serĉas solvon racian kaj oportunan.

Ke *muta naturo* estas neracia, tio ŝajnas sufiĉe evidenta. Temas nek pri naturo, nek pri mutio. Muzikiloj aŭ horloĝoj (kaj precipe vekhorloĝoj) ne estas mutaj, sed povas aperi en la koncernaj bildoj. Akvariaj fiŝoj, testudoj ktp, eĉ mutaj homoj, estas mutaj sed ne pri ili temas.

Koncerne la oportunan, min ĝenus frazo kiel

Sur la muron li pendigis tri mutajn naturojn.

Ruslingve “три натюрморта” estas same ordinara, kiel “tri portretoj”; sed “tri mutaj naturoj” sonas por mi groteske.

Kaj ruse, kaj angle facilas trovi (ekz-e per Guglo) centojn da rektasencaj uzoj de “*немая природа*” aŭ “*mute nature*”; kompreneble, neniu el ili havas la kaloĉajan signifon. Ekz-e

Advance warning of Katrina's path was wrested from *mute Nature* by meteorological calculations and satellite imagery.

At least creationists have a written historical document that is said to be the word from the Creator which requires less interpretation than *mute nature*.

Here the Benjaminian insight into the relationship between *mute nature* and expression of art assumes a very decisive role.

Nenio mirinda, ke multaj vortaroj serĉas alian solvon. Ekz-e la vortaro slovaka-esperanta⁶ proponas “senvivaĵ-pentraĵo”n. Logike neriproĉebla, tamen iom longa (kvankam pli oportuna ol la

duvorta *muta naturo*; kaj senvivaĵ-pentraĵon oni almenaŭ povas pendigi sur la muron).

Terminoj memklarigaj

La bazo de la naturisma skolo (ankaŭ de PIV kaj PAG) estas ĝia profunda malvido je la propraj rimedoj de Esperanto. Por ĝi nur la eksteresperanta tradicio estas respektinda, nur la fremdlingva leksiko estas valora. Originalajn solvojn propre esperantajn ĝi malakceptas.

Tio ĝenerale estas ofta inter la fakaj homsciencistoj — lingvistoj, historiistoj, kuracistoj ktp. Male, la inĝenieroj ŝatas ludi per la propraj rimedoj de la lingvosistemo, krei originalajn solvojn, kaj ĝuste tiajn solvojn plej alte taksas.

Tio memorigas al mi la rakonton pri ŝaho kiu ŝatis poezion. Foje li ricevis gazelon de eminenta poeto; la gazelo ege plaĉis al la ŝaho, tiel ke li ordonis doni al la poeto po unu perlon pro ĉiu nobla rimo tradicia, kaj elbati po unu denton pro ĉiu nova rimo originala. La parnasisma skolo tre similas la poeziaman ŝahon.

Kalocsay serĉis solvon en la materialo ekstera; sed la propra lingvomaterialo de Esperanto disponigas la bezonatajn rimedojn je sia baza nivelo: Esperanto entenas la morfemojn *ul* kaj *aĵ* kiuj servas por kontrastigi la personecon kaj objektecon.

Tial la plej evidenta solvo estus diri *aĵpenetraĵo* (kiel oni diras “marpenetraĵo” por la franca *marine*, la angla *seascape*); aŭ *aĵbildo*; aŭ eĉ pli simple kaj aŭdace *aĵ-aĵo* (analogie al *pays-age* kaj *Land-schaft*).

Eble tio ŝajnus nesufiĉe preciza; oni povus indiki, ke normale temas ne pri unu aĵo, sed pri arta komponaĵo, pri pluraj aĵoj iel dismetitaj. Ĝuste tiun ideon uzas la suoma vorto *asetelma* por nomi la koncernan ĝenron pentrartan (jen ekzemplo por la naturistoj: ne ĉiuj lingvoj sklave

“Matenmanĝo” (1731) de Jean-Baptiste-Siméon Chardin (1699-1779).



kopias fuŝajn modelojn!). Oni do povus diri *aĵaranĝo* (kiel oni diras *hararanĝo*, *floraranĝo* ktp).

Esperanto disponigas multajn eblojn al tiuj, kiuj pretas akcepti ĝian povon; la sola problemo estas la elektembaraso: kion oni elektu inter *aĵbildo*, *aĵpenetraĵo*, *aĵaĵo*, *aĵaranĝo* ...

Al mi plaĉas *aĵpenetraĵo*: ĝi estas facile komprenebla, ĝi koheras kun samtipa *marpenetraĵo*, ĝi ebligas formi terminon *aĵpentristo* (simile al *portretisto*, *pejzaĝisto*, *marpentristo*); samkiel *portreto* (kaj malkiel *pejzaĝo*) ĝi malkonfuzas la *naturon* (t.e. la prototipajn aĵojn) disde ties bildo.

Sed naivan esperantiston povas konfuzi duobla uzo de la vortero *aĵ*, unuafoje kiel plensenca radiko, kaj duafoje kiel sufikso (persone al mi ĝuste tio plaĉas, ĉar tio faras la vorton pli interesa); probable la vorto *aĵbildo* estas do pli rekomendinda. Cetere, ĝi havas siajn avantaĝojn: pli mallonga; kaj pli ĝenerala (ekz-e eblas paroli pri *aĵbildo brodita*, *fota* ktp).

Notoj

1. Probable maleblas pluraligi la ekzemplon (1): anstataŭ “li multe pentris laŭ la *naturaj*” oni normale dirus “li multe pentris laŭ (la) *naturon*”; kp “li vendis tri mutajn naturojn”. — La intenco de la ekzemplo (3) mi ne komprenas.

2. P. Benson: *Comprehensive English-Esperanto Dictionary*. ELNA, 1995.

3. En la franca vortaro de *Robert* la termino *nature morte* havas apartan artikolon, sendependan je la artikolo *nature* (el kiu ĝi tamen estas referencita). Tamen PIV imitas la filologie malpli kleran vortaron *Petit Larousse*, kiu traktas *nature morte* sub *nature*.

4. La precizema rusa lingvo ĉerpis el ambaŭ fontoj kaj specialigis la sencojn de la pruntaĵoj: la pentrarta termino estas la francdevena *пейзаж*, dum la germandevena *ландшафт* priskribas la geografian aŭ orografian realaĵon. *Stepo*, *tundro*, *dezerto*, *tajgo*; *montaro*, *ebenaĵo* ktp estas specoj de *ландшафт*; la diferenco estas kiel inter *portreto* kaj *antropologia tipo*.

5. Tamen tia misanalizebla radiko jam ĉeestas en la Fundamento: *procento* estas eĉ mispresentita kiel derivaĵo de *cent*, kiel *pro-cent-o*.

6. Št. R. Seemann: *Esperanta-slovaka kaj slovaka-esperanta vortaro*. Bratislavo, 1970.

Feliĉo ekster difinoj: Boris Pasternak

de Grigorij Arosev

La finiĝanta jaro 2010 entenis, same kiel ĉiuj aliaj, multegajn jubileojn, sed inter aliaj — la 120-jariĝon de naskiĝo kaj la 50-jariĝon de morto de Boris Leonidoviĉ Pasternak, unu el plej elstaraj ruslingvaj verkistoj.

Konstatu, ke ĵus ne estis menciita lia nacia aŭ ŝtata aparteno. Sendube pli ol duonon (43 jarojn) de la vivo li pasigis, estante civitano de USSR, sed li naskiĝis kaj formiĝis en tute alia lando — Ruslanda imperio. Lia unuaj versaĵoj aperis aprile de 1913, kaj lia unua poemokolekto (*Ĝemelo en nuboj*) — fine de la sama jaro. Do estus malvero diri ke Pasternak estis nur “sovetia” verkisto. Samtempe li preskaŭ neniam publike kontraŭstaris Sovetunion, kaj dum certa tempo li eĉ estis rekonata kiel “ĉefa landa poeto” (tia titolo, kompreneble, oficiale ne ekzistis, sed oni traktis la verkiston ĝuste ĉi-maniere). Pasternak reagis je okazintaĵoj ĉirkaŭ si pli kaj pli akre nur fine de la vivo, kiam komenciĝis problemegoj pro eksterlanda publikigo de *Doktoro Ĵivago* kaj persekutado pro la atribuo de Nobel-premio al li.

Estus erare diri pri li “rusa” verkisto. Li ne estis rusa laŭ la deveno (sed juda), sed li la tutan vivon ĉiel negis sian rilaton al juda kulturo, substrekante kaj emfazante, ke el la nacia vidpunkto lia tasko estis asimiliĝi — do evidentas ke li ne opiniis sin plene rusa (kio, konsiderante lian rolon en literaturo, estas vere stranga). Isaiah Berlin, fine de 1945 veninta en Moskvon kaj konatiĝinta kun Pasternak, poste rakontis: “Li ege ne volis tuŝi ĉi tiun temon — tio ne signifas, ke ĝi aparte ĝenis lin — sed simple estis por li tre malagrabla. Li volus, ke ĉiuj judoj asimiliĝu. Mi rimarkis, ke ajna mencio de judoj aŭ Palestino kaŭzis por Pasternak videblan suferon”. (Dmitrij Bykov, *Pasternak*, Moskva, 2006)

Do fakte li estis nek ruslanda, nek sovetia, nek rusia, nek rusa, nek juda. Same estas malfacile difini lian literaturan rolon. Li estis kaj restas unu el la kolosoj de la ruslingva poezio de la 20-a jarcento. Sed lia ĉefa verko, kiu donis al li tutmondan famon, estas ja la romano pri Jurij Ĵivago, do prozaĵo. Samtempe liaj tradukoj el Goethe, Schiller, Shakespeare, Calderon fariĝis klasikaj — legataj, ŝatataj kaj ĝis nun uzataj en



surscenigoj kaj ekranigoj. Nur pri dramverkado li ne multe spertis — li eklaboris pri sia unua dramo *Blinda belulino* nelonge antaŭ la morto kaj ne sukcesis fini ĝin (li verkis nur la unuan akton), do kiu scias, kio rezultus, se li sukcesus...

Ĉio ĉi ne estas hazardo, sed tute logika ĉeno, se rigardi lian tutan vivon komplekse. Kun granda malŝato li rilatis al diversaj organizaĵoj — burokrataj kaj literaturaj, ĉiel evitis ilin. Li membris en la Unio de verkistoj, kaj eĉ iom aktivis komence de ties ekzisto (ĝuste dum la unua kongreso de la unio Nikolaj Buĥarin, fama sovetia politikisto, proponis rekonii Pasternak-on “la plej bona poeto de Soveta Unio”), sed neniam en la komunisma partio. En sia juneco li ioman tempon apartenis al la futurisma grupo *Centrifuga*, sed post ĝi aliĝis nenien. Eĉ lia Nobel-laŭreateco fariĝis maltradicia, kvankam certe li preferus esti tute ordinara ricevinto, sed ne skandale malpropravola rifuzinto (por esti precizaj ni menciū, ke Pasternak ne estis unika ĉi-rilate — antaŭ kaj post li okazis libervolaj kaj devigaj rezignoj de la premio).

Pasternak ĉiam estis ekster ĉiuj imagleblaj limoj, difinoj kaj nocioj.

Lia sorto aspektas preskaŭ ideala kompare kun plejparto de liaj “samplumanoj” de la 20-a jarcento. Jes, li longan tempon spertis malfavoron de la potenculoj. Jes, li estis persekutata kaj


turmentata pro atribuo de Nobel-premio, kaj rezulte de tio li malsaniĝis kaj forpasis. Jes, lia lasta amata virino, Olga Ivinskaja kune kun sia filino nemalmultajn jarojn pasigis en prizono — pro la proksimeco kun li. Tamen responde al ĉiuj “jes, li...” ekzistas multaj “sed”-oj. Pasternak mortis 70-jara kaj en propra lito — malkiel la suicidintaj Jesenin aŭ Majakovskij. Pasternak vivofine ne estis malriĉa — malkiel Blok, mortinta 41-jara en mizerego. Pasternak eĉ unu tagon ne pasigis en mallibero, malkiel Mandelŝtam kaj multaj aliaj.

“La vivo estis bona. Mi ĉion sukcesis”, — li diris kelkajn tagojn antaŭ la morto. Multaj homoj mencias lian unikan elradiatan energion de feliĉo, optimismon kaj viv-amon. Pasternak estis kvazaŭ naskita por feliĉo, por ĝojo, por ĉies admiro kaj ŝato, kaj la vivajn malfacilaĵojn li postvivis digne kaj firme. Tragikajn erojn de sia vivo li taksis nur hazardo, lia ĝenerala humoro estis absolute vitala, feliĉa kaj inspira.

*Konsolas, en lumo malforta
apenaŭ falanta sur lit',
konscii min mem kaj la sorton
plej kara donaco de vi.*

Cetere, ankaŭ ĉi sinteno estas maltradicia por la rusa poezio, kiu kutimas spleni pro malreciproka amo kaj civitana malkontento. La feliĉon (literaturan kaj vivan) de Pasternak nepre eniras tragedio, sed li ne lamentas pro tio. Li respektas ties skalon. Dmitrij Bykov mencias, ke ĉiuj plorantaj virinoj en poemoj de Pasternak unuavice estas elstare belaj.

Eĉ la lasta vorto en lia vivo estas tre karakteriza. Malgraŭ la turmenta malsano (pulma kancero) li restis en plena konscio. Kelkajn sekundojn antaŭ la morto li diris al la edzino: “Pardonu”. Kaj post ioma paŭzo: “рад” [rad]. (Rekta traduko — “ĝoja” aŭ “ĝojas”, sen pronomo aŭ substantivo.) Pasternak ĝis la pleja fino ne perfidis sian ĝeneralan direkton — direkton de animo, koro kaj talento. Ĉio, kion li verkis, estas promeso de feliĉo kaj pli bona vivo — laŭ li, ĉiuj estos pardonitaj kaj absolutitaj. Tion li sincere kredis dum la tuta vivo — ĉiujn sepdek jarojn, tri monatojn kaj dudek tagojn.



Dio – unu por ĉiuj

(Surata kafejo)

**Rakonto verkita de Lev Tolstoj
laŭ Bernardin de St Pierre**

Estis en la hinda urbo Surato* kafejo. Venis tien el diversaj landoj traveturantaj fremduloj kaj ofte interparoladis.

Eniris tien foje persa scienculo-teologo. La tutan vivon li studis esencon de Dieco, legis kaj skribis librojn pri tio. Longe li pensis, legis kaj skribis pri Dio, lia cerbo tropleniĝis, intermiksiĝis ĉio en lia kapo, kaj li eĉ ĉesis kredi Dion.

Eksciis pri tio la caro kaj ekzilis lin el la persa regno.

La tutan vivon rezonante pri la praa kaŭzo, komplik-iĝis la malfeliĉa teologo, kaj anstataŭ kompreni, ke li mem perdis la saĝon, ekimagis, ke ne estas plu Saĝego, reganta la mondon.

Havis tiu teologo sklavon — afrikanon, akompanantan lin ĉie. Kiam la teologo eniris la kafejon, la afrikano restis ekstere apud la pordo, kaj sidiĝis sur ŝtonon, sub varmega suno; li sidas kaj forpelas de si muŝojn. La teologo mem kuŝiĝis sur sofon en la kafejo kaj ordonis doni al li tason da opio. Kiam li eltrinkis la tason kaj la opio ekmovis lian carbon, li sin turnis al sia sklavo.

— Nu, sklavo malŝatinda, — diris la teologo: — diru al mi, kiel ci pensas, ĉu ekzistas Dio aŭ ne?

— Kompreneble, ekzistas! — diris la sklavo kaj tuj eltiris el sub la zono malgrandan lignan idolon. — Jen, diris la sklavo, — jen tiu dio, kiu gardas min, dum mi vivas en la mondo. Tiu dio estas farita el branĉo de la sama sankta arbo, kiun adoras ĉiuj en nia lando.

Ekaŭdis tiun dialogon inter la teologo kaj sklavo aliaj ĉeestintoj en la kafejo kaj ekmiris.

Mirinda ŝajnis al ili la demando de la mastro kaj ankoraŭ pli mirigis ilin la respondo de la sklavo.

Bramano, aŭdinta la parolojn de la sklavo, sin turnis al li kaj diris:

— Malfeliĉa sensaĝulo! Ĉu estas penseble, ke Dio povas troviĝi sub la zono de homo? Estas nur unu Dio — Bramo. Kaj tiu Bramo superas la tutan mondon, ĉar li kreis la tutan mondon! Bramo estas sola, granda Dio, — tiu Dio, por kiu oni konstruis la templojn sur la bordoj de la rivero Gango; tiu Dio, al kiu servas Liaj unikaj pastroj — bramanoj. Nur tiuj pastroj konas la veran

Dion. Pasis jam dudek mil jaroj, multaj perturbacioj okazis en la mondo, kaj tamen tiuj pastroj restas la samaj, kiaj ili estis ĉiam, ĉar Bramo, sola vera Dio, protektas ilin.

Tiel diris la bramano, certa, ke li konvinkos ĉiujn, sed la ĉeestanta tie hebrea monŝanĝisto kontraŭdiris al li.

— Ne, — diris li. — La templo de la vera Dio estas ne en Hindujo!.. Kaj Dio protektas ne la kaston de la bramanoj! La vera Dio estas ne Dio de bramanoj, sed Dio de Abrahamo, Isaako kaj Jakobo. Kaj protektas la vera Dio nur sian popolon Izraelan. Dum ekzistas la mondo, senĉese Dio amis kaj amas sole nian popolon. Kaj se nuntempe nia popolo vivas dispelita sur la tero, tio estas nur provo de la fideleco, sed Dio, laŭpromese, ree kunvenigos sian popolon en Jerusalemon, por ke, restariginte la mirindaĵon de la antikveco — Jerusaleman templon, Li faru Izraelon regantan super ĉiuj nacioj.

Tiel diris la hebreo kaj ekploris. Li volis daŭrigi la paroladon, sed aŭdinta tion italo interrompis lin.

— Malvere vi opinias, — diris la italo al la hebreo. — Vi atribuas al Dio la maljustecon: Dio ne povas ami unu popolon pli, ol aliajn. Male, se li eĉ estis antaŭe protektanta Izraelon, — jen pasis jam 1800 jaroj, de kiam Dio ekkoleris, ĉesigis sian protekton kaj dispelis tiun popolon tra la tero, tiel ke ĝia kredo ne nur ne disvastiĝas, sed apenaŭ ie restas. Dio al neniu popolo montras preferon, sed vokas ĉiujn, kiuj deziras savon, rifuĝi ĉe la sola romo-katolika eklezio, ekster kiu oni ne povas sin savi.

Tiel diris la italo. Sed alia ĉeestanto — protestanta pastro, paliĝinte, respondis al la katolika misiisto:

— Kiel vi povas certigi, ke nur via konfeso ebligas la savon? Ne, sciu, ke savitaj estos nur tiuj, kiuj, laŭ la Evangelio, servados Dion en spirito kaj vero, laŭ la leĝo de Jesuo.

Tiam turko, oficisto de surata dogano, kiu sidis tie, fumante pipon, gravmiene sin turnis al du kristanoj.

— Vane vi estas tiel konvinkita pri la vereco de via roma kredo, — diris li. — Pasis jam ĉirkaŭ sescent jaroj, post kiam vian kredon anstataŭis la vera kredo de Mahometo. Kaj, kiel vi mem vidas, la vera kredo de Mahometo ĉiam pli kaj pli disvastiĝas kaj en Eŭropo, kaj en Azio, kaj eĉ en la klera Ĥinujo. Vi mem konfesas, ke la hebreo estas forlasitaj de Dio, kaj, por pruvi tion, vi

*Urbo iom norde de Bombajo, havinta antaŭe tre gravan komercan signifon.

diras, ke la hebreoj estas malŝatataj, kaj ilia kredo ne disvastiĝas. Konfesu do la verecon de la kredo Mahometa, ĉar ĝi superregas kaj konstante disvastiĝas. Sin savos nur la kredantoj je la lasta Dia profeto Mahometo. Kaj eĉ el tiuj — sole la Omaranoj, ne la Alianoj, ĉar ili neprave kredas.

Post tiaj vortoj, la persa teologo, el la sekto de Ali, volis kontraŭdiri. Sed en la kafejo tiutempe fariĝis disputego inter ĉiuj ĉeestantaj alilanduloj de diversaj kredoj kaj konfesoj. Estis tie kristanoj abisenaj, hindaj, lamaoj, ismaelitoj kaj fajradorantoj.

Ĉiuj disputadis pri la esenco de Dio kaj pri tio, kiamaniere oni devas Lin adori. Ĉiu asertis, ke nur en lia lando oni konas la veran Dion kaj la veran kulton al Li. Ĉiuj disputadis, kriadis. Nur unu ĥino, disĉiplo de Konfucio, sidis trankvile en angulo de la kafejo kaj ne partoprenis je la disputado. Li trinkis teon, aŭskultis, kion oni parolis, sed li mem silentis. La turko, rimarkinte lin dum la disputado, sin turnis al li kaj diris: Helpu min almenaŭ ci, bona ĥino. Ci silentas, sed ci povus diri ion por mia utilo. Mi scias, ke ĉe vi en Ĥinujo nun estas enkondukataj diversaj kredoj. Viaj komercantoj ne unu fojon diris al mi, ke viaj ĥinoj el ĉiuj aliaj kredoj preferas la mahometanan kaj volonte konvertiĝas. Subtenu do miajn vortojn kaj diru, kion ci pensas pri la vera Dio kaj Lia profeto.

— Jes, jes, diru, kion ci pensas, — sin turnis al li ankaŭ aliaj.

La ĥino, disĉiplo de Konfucio, fermis la okulojn, pripensis kaj poste, malferminte ilin, liberigis siajn brakojn el la larĝaj manikoj de sia vesto, kunigis ilin sur la brusto kaj ekparolis per voĉo mallaŭta kaj trankvila.

— Sinjoroj, — diris li, — al mi ŝajnas, ke la apartiĝemo de l' homoj, pli ol io ajn, malhelpas ilian interkonsenton pri la religio. Se vi bonvolos aŭskulti min, mi klarigos al vi tion per ekzemplo.

Mi marveturis el Ĥinujo al Surato sur angla ŝipo, ĉirkaŭirinta la mondon. Survoje ni alordiĝis ĉe la orienta bordo de la insulo Sumatra, por preni akvon. Tagmeze ni elŝipiĝis kaj sidiĝis ĉe la bordo de la maro en la ombro de la kokospalmoj, proksime de la vilaĝo insulana. Ni sidis — kelkaj homoj el diversaj landoj.

Dum ni estis sidantaj, al ni venis blindulo.

Tiu homo blindiĝis, kiel mi sciigis poste, dank' al tio, ke tro longe kaj obstine rigardis la sunon, dezirante kompreni, kio estas la suno. Li volis scii tion, por posedi la lumon de la suno.

Klopodadis li longe, utiligante ĉiujn sciencojn: li deziris forpreni kelkajn radiojn de la suno, kapti ilin kaj enŝtopi en botelon.

Longe li klopodis kaj ĉiam rigardis al la suno, sed nenion povis fari; al li okazis nur tio, ke pro la suna lumo malsaniĝis liaj okuloj, kaj li blindiĝis.

Tiam li diris al si:

— La lumo suna ne estas fluido, ĉar tiastate oni povus ĝin transverŝi, kaj pro la vento ĝi ondiĝus, simile al akvo. La lumo suna ne estas ankaŭ fajro, ĉar tiuokaze ĝi estingiĝus en la akvo. La lumo ne povas esti spirito, ĉar oni vidas ĝin, kaj ne korpo, ĉar oni ne povas ĝin movi. Do ĉar la lumo suna estas nek fluido, nek fajro, nek spirito, nek korpo, — ĝi estas nenio.

Tiel li konkludis, kaj samtempe, pro tio, ke li ĉiam rigardis la sunon kaj ĉiam pensis pri ĝi li perdis la vid-senton kaj la saĝon. Fariĝinte tute blinda, li jam tute certiĝis pri tio, ke la suno ne ekzistas.

Kun tiu blindulo venis ankaŭ lia sklavo. Li sidigis sian mastron en la ombro de la kokosarbo, levis de la tero kokoson kaj komencis fari el ĝi noktan lampeton. Li faris la meĉon el kokosa fibro, elpremis el la nukso oleon en la ŝelon kaj trempis en ĝi la meĉon. Dum la sklavo estis preparanta sian lumigilon, — la blindulo, ekĝeminte, diris al li:

— Nu, sklavo, ĉu mi ne vere diris al ci, ke la suno ne ekzistas? Ci vidas, kiel mallume estas. Kaj oni diras — suno... Sed kio estas la suno?

— Ne scias mi, kio estas la suno, — diris la sklavo. — Ĝi min ne interesas. Sed la lumon mi konas. Jen mi pretigis la lampeton, al mi estos lume, ankaŭ al ci mi povos fari servon per ĝi kaj ĉion trovi en mia tendo.

Kaj la sklavo prenis en la manon sian ŝelon.

— Jen, — diras li, — mia suno.

Apude sidis lamulo kun lambastono. Li aŭdis tion kaj ekridis.

— Verŝajne, ci estas naskeblinda, — diris li al la blindulo, — se ci ne scias, kio estas la suno. Mi diros al ci, kio ĝi estas: la suno estas fajra globo, kaj tiu globo ĉiutage sin levas el la maro kaj ĉiutage sin kaŝas inter la montoj de nia insulo; tion ni ĉiuj vidas, kaj ci vidus ankaŭ, se ci povus.

La fiŝkaptisto, sidinta apude, aŭdis tiujn vortojn kaj diris al la lamulo: — Oni tuj vidas, ke ci nenie estis, krom ĉi insulo. Se ci ne estus lama kaj ŝipiradus sur la maro, ci scius, ke la suno subiras ne inter la montoj de nia insulo, sed kiel ĝi leviĝas el la maro, tiel vespere denove subiras en la maron. Mi parolas ĝuste, ĉar ĉiutage ĝin vidas per miaj okuloj. Aŭdis tion la hindo.

— Mi miras, — diris li, — kiel intelektulo povas paroli tiajn stultaĵojn. Ĉu estas eble, ke fajra globo subakviĝas kaj ne estingiĝas? La suno estas tute ne fajra globo, sed Diaĵo, nomata Deva. Tiu Diaĵo veturadas sur ĉaro tra la ĉielo ĉirkaŭ ora monto Speruvja.

Okazas, ke malbonaj drakoj Ragu kaj Ketu atakas Devon, englutas ĝin, kaj tiam fariĝas mallume. Sed pastroj niaj preĝas, por ke la Diaĵo sin liberigu, kaj tiam ĝi liberiĝas. Nur tiaj malkleraj homoj, kiel vi, neniam vojaĝintaj ekster sia insulo, povas imagi, ke la suno lumas sole por ilia insulo.

Tiam ekparolis alia ĉeestinto — mastro de la egipta ŝipo.

— Ne, — diris li, — tio ankaŭ ne estas vera, la suno ne estas Diaĵo kaj iras ne nur ĉirkaŭ la Hindujo kaj ĝia ora monto. Mi multe marveturis sur la Nigra maro, kaj apud bordoj de l' Arabujo, mi estis ankaŭ sur Madagaskaro, kaj sur la Filipinaj insuloj, — la suno lumigas ĉiujn

Ĉi tiu rakonto de Tolstoj, eldonita en 1891, baziĝas sur *Le Café de Surate* (1790) de Jacques-Henri Bernardin de Saint-Pierre (1737–1814). La Esperanta traduko aperis kiel la unua ero en la *Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj* (*Posrednik*, 1912). La faksimilo estas legebla en nia retejo. Ni dankas al Maksim Griŝin, kiu rekonigis la skanitan tekston por publikigo en *La Ondo*.

landojn, ne solan Hinduojn, ĝi ne iradas ĉirkaŭ unu monto, sed ĝi levigas ĉe la insuloj de Japanujo, — tial tiuj insuloj estas nomataj Japen, — tio signifas en ilia lingvo — naskiĝo de l' suno, kaj ĝi subiras malproksime, malproksime, okcidente, post la insuloj de Anglujo. Mi ĝin bone scias, ĉar mi mem vidis multe kaj aŭdis multe de l' avo. Kaj mia avo ŝipiradis ĝis randoj mem de la maro.

Li volis paroli plu, sed angla ŝipano de nia ŝipo interrompis lin.

— En neniŭ lando, krom Anglujo, — diris li, — oni scias pli bone pri tio, kiel iras la suno. La suno, — ni ĉiuj ĝin scias en Anglujo, nenie levigas kaj nenie subiras. Sed ĝi marŝas senĉese ĉirkaŭ la tero. Ni bone ĝin scias, ĉar ni mem ĵus ĉirkaŭveturis la teron kaj nenie tuŝis la sunon. Ĉie ĝi tiel same, kiel tie ĉi, matene aperas kaj vespere malaperas.

La anglo prenis bastonon, desegnis sur la sablo cirkon kaj komencis klarigi, kiel iras la suno en la ĉielo ĉirkaŭ la tero. Sed li ne sciis bone klarigi kaj, signante la piloton de sia ŝipo, diris:

— Li tamen estas pli instruita, ol mi kaj pli bone klarigos al vi ĉion ĉi.

La ŝipgvidisto estis homo prudenta, — tial li aŭskultis la interparoladon silente, ĝis kiam oni lin demandis. Sed nun, kiam ĉiuj sin turnis al li, li komencis paroli kaj diris:

— Ĉiuj vi trompas unu la alian kaj trompas vin mem. La suno ne rondiras la teron, sed la tero rondiras la sunon, — plie, ĝi moviĝas ĉirkaŭ si mem, turnante al la suno dum dudek kvar horoj kaj Japanujon, kaj la Filipinajn insulojn, kaj Sumatron, sur kiu ni sidas, kaj Afrikon, kaj Eŭropon, kaj Azion, kaj multajn aliajn landojn. La suno lumas ne por unu sola monto, ne por unu sola insulo, ne por unu sola maro kaj ne por unu sola terglobo, sed por multaj similaj planedoj. Ĉiu el vi povus kompreni tion, se li rigardus supren al la ĉielo, sed ne al siaj piedoj, kaj ne pensus, ke la suno lumas nur por li aŭ por lia patrujo.

Tiel diris saĝa direktilisto, multe vojaĝinta tra la mondo kaj multe rigardinta supren al la ĉielo.

— Jes, eraremo kaj malkonsento de la homoj pri la kredo devenas de l' apartiĝemo, — daŭrigis la ĥino, disĉiplo de Konfucio. — Kiel oni komprenas la sunon, tiel same — Dion. Ĉiu homo volas, ke li havu sian apartan Dion, aŭ, almenaŭ Dion de sia patrujo. Ĉiu nacio volas enfermi en sian templon Tiun, Kiun ne povas enhavi la tuta universo. Kaj ĉu povas ia templo egalvalori tiun, kiun Dio mem konstruis, por kunigi en ĝi ĉiujn homojn per unu kredkonfeso kaj unu religio?

Ĉiuj homaj temploj estas faritaj laŭ la modelo de tiu templo — mondo Dia. En ĉiuj temploj troviĝas baptoakvujoj; estas arkaĵoj, lumingoj, sanktfiguroj, surskriboj, libroj de leĝoj, oferoj, altaroj kaj pastroj. En kia templo estas tia bapto, kiel la Oceano, tia kupolo, kiel la ĉiela, tiaj lumingoj, kiel la suno, la luno, la steloj, tiaj sanktfiguroj, kiel vivantaj, amantaj, helpantaj unu la alian homoj? Kie estas la surskriboj pri la Bonegeco de Dio, tiel kompreneblaj, kiel la bonfaroj ĉie dissemataj de Dio por la feliĉo de la homoj? Kie estas tia leĝolibro, tiel klara al ĉiu, kiel la skribita en lia koro? Kie estas la oferoj, similaj al la oferoj de l' abnegacio, kiujn la amantaj homoj faras por siaj proksimuloj? Kaj kie estas la altaro, simila al la koro de bona homo, kie Dio mem akceptas la oferon? Ju pli alte homo komprenos Dion, des pli bone li Lin konos. Kaj ju pli bone li konos Dion, des pli li proksimiĝos al Li, imitos Lian Bonegecon, kompatemon kaj amon al homoj.

Sekve, tiu, kiu vidas tutan lumon de la suno, pleningantan la mondon, ne mallaŭdu kaj ne malestimu superstiĉulon, vidantan per sia idolo nur unu radion de la sama lumo; li ne malŝatu ankaŭ senreligiulon, kiu blindiĝis kaj tute ne vidas la lumon.

Tiel diris la ĥino, disĉiplo de Konfucio, kaj ĉiuj ĉeestantoj en la kafejo eksilentis kaj ne plu disputis pri tio, kies kredo estas pli bona.

Tradukis el la rusa **Anna Ŝarapova**

POR KIO ESTAS ELDONATA “TUTMONDA BIBLIOTEKO JE LA MEMORO DE L. TOLSTOJ”

“Unu animo en ĉiuj”, — vere diras L. Tolstoj. Tial ĉefa tasko de homa vivo estas ĉiam pli granda frata unuiĝo de homoj, de gentoj kaj de popoloj kaj, plue, unuiĝo de ĉio vivanta sur la tero.

Nia eldona firmo “Posrednik” (Peranto), kiu estas fondita de L. Tolstoj en 1885 jaro, kaj kiu nun estas esperantia entrepreno, starigis kiel sian taskon eldonadon de libroj, disvastigantaj ideojn de la frata unuiĝo de homoj kaj de ĉio vivanta en mondo. Pro tio, ke la internacia lingvo Esperanto estas kreita nome por tia celo de la unuiĝo de homoj de ĉiuj gentoj kaj popoloj, nia eldona firmo nun komencas eldonadon de libroj en lingvo Esperanto.

Plej alta, plej ĝojiga unuiĝo de homoj estas unuiĝo en komunaj sentoj de frateco, de amo, de heroa kaj modesta ĉiutaga sindonemo, de kompatemo rilate al

ĉiuj vivaj estaĵoj, de frata kunhelpado kaj kunlaborado de homoj por komuna bono. Pro tio libroj de esperanta fako de nia eldona firmo estos celantaj ĉefe disvastigadon de tiuj ĉi sentoj, de tiuj ĉi ideoj.



Serio de niaj esperantaj eldonaĵoj estas nomata “Tutmonda Biblioteko” kaj estas dediĉita al la memoro de nia amiko Lev Nikolaeviĉ Tolstoj, granda predikanto de la unuiĝo de ĉiuj vivoj en mondo.

Komencante tiun ĉi aferon, ni forte esperas subtenadon de ĉiuj, kunsentantaj al la afero. Tiu ĉi subtenado povas esprimiĝi en komunikadoj al ni de verkoj kaj de artikoloj, presitaj en iaj ajn lingvoj kaj plej konformantaj al la fundamentaj ideoj de “Tutmonda Biblioteko”, kaj en helpado de kiel eble plej vasta disvastigado de libretoj de “Tutmonda Biblioteko” en ĉiuj landoj, kie estas uzata la lingvo Esperanto.

Amikoj en ĉiuj landoj! akceptu saluton de nia frata amo. Ni laboru amike kune por komuna sankta al ni celo.

Ĉefa redaktoro-eldonanto de firmo “Posrednik” **I. Gorbunov-Posadov**

Ombro sur interna pejzaĝo

En la Esperanta originala literaturo oni facile trovas verkojn, en kiuj la aŭtoro uzis sian plenan imagpovon por rakonti nenion pri si mem, nenion el siaj spertoj aŭ sentoj, kaj nenion pri la reala vivo, ofte kaŝante ĉi vakuon sub komplika intrigo kaj vepra lingvaĵo. Kompreneble, fojfoje tamen io el la vivo likiĝas inter la linioj. Sed la surfaco preskaŭ ĉiam estas fantazia. Ni disponas pri admirinda kvanto da krimromanoj, fantastaj romanoj, sciencfikcio, utopioj, distraĵoj, filozofiumado, fabeloj kaj epopeoj.

Ombro sur interna pejzaĝo de Spomenka Ŝtimec estas alia. Tre alia. Ĝi estas verko vera, kiu povus aperi en nacia literaturo. Persona, senŝminke sincera rakonto el la privata vivo de iu “mi”. Ne gravas, ĉu tiu “mi” identas aŭ similas al la aŭtorino. Gravas la verko, kiun ŝi kreis, kaj ĝi estas granda artaĵo rava, pentrita per simplaj rimedoj — pli ĝuste: ŝajne simplaj. Laŭ sia rakonta formo ĝi estas klare modernisma verko, en kiu diversaj tempoj kaj lokoj alternas kaj iufoje eĉ miksiĝas, filtriĝas tra la pensoj de la rakontanta mio.

La verko aperis en 1984 kaj rapide famiĝis inter legantaj esperantistoj. Ŝajne ĝi ĝis nun ne eksmodiĝis. Se oni guglas la titolon, oni trovas atestojn, ofte de junaj homoj, kiom signifis la legado de tiu romano. Oftas la opinio, ke ĝi prezentas realan vivon, male al aliaj Esperantaj verkoj.

Ĝi estas amrakonto, kiu komenciĝas je la momento, kiam la amo finiĝis — almenaŭ unuflanke, ĉe la alia, la kunulo. “Kiam li foriris li forportis nenion krom tajpilo. Kiam li fermis la pordon post si, mi sentis min komplete priŝtelita”. (p. 13) Ĝia temo estas la iom-post-ioma fado de kuneco, kaj la klopodoj de la protagonistino al kutimiĝi, akcepti aŭ malakcepti, elteni, la staton de eksulino. La aŭtorino plenumas tion en tia trafa maniero, ke ĉiu homo, kiu iam trovis sin ies eksulo, devas rekonii la sentojn, la reagojn, la agojn. La talento de Spomenka Ŝtimec estas trovi ĝuste la plej sukajn kaj unike signifoportajn detalojn el miloj da bagateloj en la ĉiutaga vivo, konkretajn detalojn, kiuj vivigas la sentojn de la leganto pli ol mil abstraktaj vortoj.

Sperto ekzemple, kiel ŝi igas la hejmajn objektojn atesti pri la ekskuneco:

Inter lia foriro kaj mia solsento la nokto ekkonstruis sian unuan matenon. Mi revenas liten. La polmo metita subvangan por doni falsan impreson, ke iu



ĝin varmigas. Mensogo! Tio estas mi! Mi mem!

Diskrete mallumigi la lampon! Neniu movo por ne vekii la triston, kiu laca endormiĝis.

Mateno grizigas la ĉambron. Li kutimis fermi ŝutojn, mi ne. Tial nun la mateno aperas frue kaj grize kolorigas leviĝon.

— *Vi devas mem fermadi ŝutojn ĉiuvespere!* — *komentas la voĉo aferece.* (p. 102–103)

Ankaŭ la medio de la romano estas malofta en la Esperanta literaturo — la nuntempo, la ĉiutaga vivo de veraj, normalaj homoj. La fakto, ke ĝi okazas meze de Esperantio, en plurnacia esperantista medio, kompreneble alportas plian valoron. Ĝi ja temas pri ni, kiuj renkontiĝas en kongresoj kaj festivaloj, enamiĝas, korespondas, klopodas kunvivi, elreviĝas...

Tra la verko regas tono de humanismo, kiun oni rekonas el aliaj verkoj, kiel la natura, propra sinteno de la aŭtoro. Al ĉiuj personoj en la verko, ankaŭ al la “mi”, la aŭtoro estas senflata sed ne senkompata. Al mi profunde impresis la suba epizodo, memoro el la feliĉa tempo, kiam la paro ankoraŭ ne estis eksparo. Sed ankaŭ tiam troviĝis eksulino — alia virino — kaj jen sentu la vibrojn de ĵaluzo, kulpo, antaŭtimo kaj — kolegineco:

Kiam mi alvenis liaurban li diris ke mi konatiĝos kun lia eksedzino. Mi ne tro scivolemis. Ial mi fartis malkomforte. Mi preferus vidi ŝin de malproksime por ne devi paroli kun ŝi. [...]

— *Ĉu vi volas ke ni vizitu ŝin hodiaŭ?*

— *li demandis iun posttagmezon. Li ne diris ŝin, li uzis ŝian nomon. Mi preferus diri ne, sed mi akceptis. Ĝi iam okazu. Mi atendis dum li laĉis siajn ŝuojn. La laĉado ne longe daŭris. Mi ekdeziris ke ŝi ne estu hejme. [...]*

Kiel impresas renkonti sian eksedzinon?

Ĉu dum konversacio ne enŝteliĝas ilia unua supo el poreo, komune kuirita iun foran posttagmezon? Tiu supo kaj tiu posttagmezo apartenas nur al ili. Neniu povas ĝin kundividi. La fakto, ke mi ĝin enkapigis, estis nur vana klopodo, eniri ilian vivon antaŭ ol en ĝi estis mi. [...]

Mi pensas pri tio kiom da fojoj Jan malfermadis konservaĵojn por ŝi. Vespermanĝo. Oni serĉas pri iu neŭtrala temo kaj trovas ĝin. (p. 47–50)

La lingvaĵo de Ŝtimec estas tre simpla, sed riĉa je valoroj. El ĉiuj Esperanto-verkistoj, ŝi estas tiu, kiu kapablas eldiri plej multe per la plej simplaj rimedoj. Male al tro da aliaj, ŝi esence ne verkas per vortoj, sed per imagoj, situacioj, agoj, kiujn ŝi vestas per la plej proksime troveblaj vortoj — almenaŭ tiel ŝajnas. Kredeble la vero estas pli komplika. Kelkaj el la ĉapitroj de *Ombro...* estas reciklitaj noveloj, kiuj aperis ankaŭ en pli frua versio en la novelaro *Vojaĝo al disiĝo* (kiu tamen eldoniĝis pli malfrue, laŭ la lama logiko de Esperanta eldonado). Do, ni povas kompari la lingvaĵon de tiuj du versioj, kaj konstati, ke efektive Spomenka Ŝtimec poluris sian lingvaĵon, kiu jam komence ja estis bela. Do, kiel ĉe multaj grandaj artistoj, ankaŭ ĉe ŝi eble la simpleco ne estas tiel simpla afero!

Post *Ombro...* ni ja ricevis ankoraŭ kelkajn romanojn, kiuj prezentas — membiografie aŭ ne — spertojn kaj memorojn el la intima vivo de romana protagonisto. *Hetajro dancas* de Eli Urbanová estas unika kreaĵo, precipe el forma vidpunkto. *Fajron sentas mi interne* de Ulrich Matthias kaj *Adolesko* de Blazio Vaha koncentriĝas je la junula evoluo. *Fadenoj de l' amo* de Gerrit Berveling traktas amrilatojn iel duone persone, duone fantazie. Sed nedubeble la plej bona verko en tiu kampo ankoraŭ restas *Ombro sur interna pejzaĝo*.

Iuj recenzantoj ja laŭdis la stilon de Ŝtimec sed trovis la enhavon banala, negrava. Sole la stilo tamen neniel klarigas la pozicion de ĉi romano inter legemaj esperantistoj, precipe el iom pli junaj generacioj. Laŭ mi ĝia “sekreto” estas, ke la aŭtoro rakontas sincere kaj trafe pri la vivo de ni ĉiuj. La leganto sentas, ke temas pri li aŭ ŝi mem. Tio esence estas malbanala. **Sten Johansson**

“Literaturo estas fajro”



Nobela kuraĝo

Ŝajne, la Nobela Akademio nun serioze klopodas regajni sian longe perditan prestiĝon: doni la premion por paco al Liu Xiaobo, malliberigito en ĉina karceroj, estas sendube kuraĝa decido. Kaj la komunistaj diktatoroj jam furioze blekas kaj konfirmas, ke tio ja estis necesa por memori, ke la homaj rajtoj valoras nenion en tiu lando.

La atribuo de la literatura Nobel-premio al Mario Vargas Llosa konfirmas evidentan paradigmoŝanĝon ĉe la svedoj. Vargas Llosa estis jam delonge evidenta kandidato kaj nun — finfine! — li ne plu estas la gajnonto de la “sekva jaro” (kiel diris Borges, kiu neniam ricevis ĝin, probable pro politikaj preferoj). La maldekstruloj etikedis Vargas Llosa novliberalulo, kaj tiu vorto estas en tiuj rondoj tiom fia, ke vi ne plu estas membro de la bona socio.

Nu, estu tiel, ankaŭ ekzistas aliaj nedoktrinaj pensmanieroj. Vargas Llosa havis simpatiojn por la maldekstrema politiko, sed, kontraŭe al sia kolego Gabriel García Márquez, li preferis ne fariĝi la putino de Castro, la dorlotita diktatoro de sudamerikaj maldekstruloj. Laŭdire Márquez neniam pardonis tiun “perfidon” (sed ĉu ne estas li, kiu perfidis siajn antaŭajn ideojn?). Vargas Llosa ja riproĉas ĉiun reĝimon, kiu ne estimas la homajn rajtojn, kaj tial ankaŭ la dekstruloj atakas lin: homaranisto ne povas esti amiko de ajna ideologio.

La vivo estas eltenebla pro la arto

La verkaro de Vargas Llosa estas ampleksa kaj ne ĉiam facile komprenebla. En siaj tiel nomataj “totalaj noveloj” Vargas Llosa klopodis redoni ĉiujn

aspektojn de la vivo, respeguli la kompleton de la socio. La leganto estas same kiel la protagonistoj de la novelo sen orientiĝo kaj devas mem trovi la sencon de sia ekzisto. Ekzemploj por tio estas *La verda domo* (1965) kaj *Konversacioj en “Katedralo”* (1969). Senkompatate Vargas Llosa analizas la koruptajn strukturojn de Peruo (“Kiam ekzakte ni komencis ekfuŝi nin mem?”).

La unuaj verkoj estis tujaj sukcesoj, sed en sekvaj verkoj li forlasis la esoterajn paŝojn kaj klopodis verki en pli simpla kaj rekte komprenebla maniero, uzis humuron kaj ne timis tuŝi la popularan ĝenron krimnovelo. Tial *Pantaleón kaj la vizitulinaj* estas esence parodio de *La verda domo*.

Vargas Llosa estis aktiva ne nur ĉe la skribotablo, sed li klopodis partopreni en la politika vivo de sia lando. En 1990 li volis fariĝi prezidento de Peruo, sed lia programo de privata iniciatemo kontraŭ ŝtata aŭtoritato estis tro radikala por tiu tempo. Pro tio li malgajnis, kaj Alberto Fujimori venkis. (En 2000 Fujimori fuĝis de la lando, ĉar lia koruptemo fariĝis neeltenebla por la peruanoj.)

Literaturo estas armilo

Danke al sia politika malvenko Vargas Llosa dediĉis sin — feliĉe por ni! — denove al la literaturo. Sed lia voĉo estas aŭdata en Peruo. Ekzemple, antaŭ nelonge la prezidento de Peruo intencis lanĉi leĝon por amnestii kulpantojn de la militista diktaturo. Vargas Llosa verkis artikolon pri la hontaj aspektoj — kaj preskaŭ tuj la prezidento mallanĉis sian leĝon. Honesteco estas la plej efika armilo de Vargas Llosa.

En 2006 aperis *La fiagoj de malbona knabino*, lia unua amromano, laŭ memdeklaro de la verkisto. Iuj argumentas, ke tio estas ĝisdatigo de *Sinjorino Bovary*. Majstre Vargas Llosa interplektas la intrigon, kiu situas en Kubo, Afriko, Japanio, malsamaj urboj de Eŭropo dum tri jardekoj. Kaj iel la knabino ĉiam sukcesas ĉeesti, kiam iu grava historia evento okazas, kvazaŭ ŝi estus sur “blua biciklo”. Eble stilistike Vargas Llosa rajdas ankaŭ sur tiu biciklo. En tiu novelo li pli detale ol en siaj antaŭaj verkoj esploras seksajn temojn.

Kaj nun ni povas senpacience atendi pri kio sonĝas la kelto en la baldaŭ publikigota novelo de Vargas Llosa. Kaj kiam ni povos ĝui ĝin en Esperanta traduko?

Wolfgang Kirschstein

Kulturo

Ne nur krim-romano

Huch, Ricarda. *La lasta somero: [Kriminala romano] / Tradukis el la germana Reinhard Haupenthal. — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2009. — 107 p.*

Laŭ la enkondukaj informoj, *La lasta somero*, romaneto de la germana aŭtorino Ricarda Huch (1864–1947), estas lerneja legaĵo, tamen ŝatata, de germanaj gimnazianoj. Temas, plu laŭ la enkonduko, pri krim-romano kun didaktikaj kvalitoj kaj pro tio merite sidanta en la oficialaj instru-programoj.

Konfesende krim-romanoj neniam vekis ĉe mi grandan intereson, eble ĉar la ĝenron mi rigardis — sendube malĝuste — iom rigida kaj antaŭvidebla.

Tamen difini *La lasta somero* kiel nur kriminalan romanon probable lamas kaj maljustas, same se oni reduktus ĝin al psikologia aŭ eĉ politika romano.

Efektive, sur la krim-intriga fono la leganto trovas ankaŭ subtilan psikologian portreton de la personoj kaj plurflankan prezenton de iliaj ideologiaj spronoj kaj pravigoj en la konvulsie prerevolucia Peterburgo komence de la dudeka jar-cento. Anarkiistoj, teroristoj, malnov-reĝimuloj kaj revoluciaj studentoj el bon-havaj familioj plektas intrigon lerte dozitan kaj atento-kaptan.

Aparta trajto de la romano estas ĝia strukturo, sen tria-persona rakont-voĉo kaj konsistanta nur el la leteroj, kiujn interŝanĝas la diversaj rolantoj. Dank’ al tia plur-voĉa tekniko eblas spuri la agojn kaj motivojn el malsamaj kaj ŝanĝiĝantaj perspektivoj, kiel en mozaiko, kio tamen je la fino liveras al la teksto solidan kaj unuecan karakteron.

La esperantigo de Reinhard Haupenthal, unu el niaj grandaj tradukistoj kaj portanta valizon kun mult-jara meti-spertado, respondas al la atendoj, kaj fluas de la komenco ĝis la fino. Nur eble neinicita leganto dankus glosareton kun klarigoj pri kelkaj vort(er)oj, kiuj ankoraŭ ne sidas en la “normiga” NPIV, sed ja aperas en ĝia neoficiala “suplemento” (t. e. la *Neologisma Glosaro* de H. Vatré): *ĵuĵuo* (bagatela luksaĵeto); *oferti* (uzata sinonime al *proponi*), *sufeto* (temo de beletra verko), *-im* (sufikso esprimanta unu solan agon), k.a.

Resume, agrabla legaĵo kun murdito (aŭ eble ne...?).

Joxemari Sarasua

Klasika detektivromano, kiu restas leginda

Conan Doyle, Arthur. *La ĉashundo de la Baskerviloj*: Krimromano / Trad. el la angla, antaŭpar. William Auld. — 2a eld. — Kaliningrado: Sezonoj, 2010. — 168 p. — (Serio *Mondliteraturo*; №6).

Jen unu el la plej famaj detektivrakontoj de la monda literaturo — apud multaj noveloj, unu el kvar romanoj de Arthur Conan Doyle pri la privata detektivo Ŝerloko Holmso. Ĝi aperis en 1901/1902, kaj ĝian daŭran popularcon montras la ekzisto de pli ol dudek filmadaptoj, el kiuj unu el la plej lastaj, de BBC, aperis en 2002.

La rakonto havas la tipajn elementojn de detektivrakonto: mistera morto, sinsekvo de indikoj, parte klarigaj, parte perpleksigaj, danĝeraj situacioj por la enketantoj, kaj majstra detektivo, kiu travidas la enigmon kaj ĉe la fino ĉion klarigas, ankaŭ por la leganto, konversacie en salono. Ĉi tiu rakonto havas ankaŭ kelkajn aliajn elementojn, kiuj certe kontribuis al ĝia populareco: nokto kaj nebulo, soleca erikejo, danĝera marĉejo, kiu povas engluti beston aŭ homon, kaj kompreneble la fantoma hundo, kiu punvizitas la posteulojn de kruela kaj sovaĝa aristokrato. (La kombinaĵo de detektivado kaj supernatura teruro estas do pli malnova ol la debuto de Skubi-Du en 1969!) Cetere, la elementoj estas lerte kombinitaj en viglan kaj leginstigan intrigon kun koncizaj sed bildigaj priskriboj de lokoj kaj agado.

Ŝerloko Holmso (kiu aperis en 1887 kaj baziĝas sur vera homo, doktoro Joseph Bell) estas unu el la plej konataj fikciaj personoj de la mondo, sed ne ĉiam oni konas lin de la originalaj verkoj, en kiuj montriĝas pli kompleksa personeco ol en multaj postaj adaptoj. Li estas lertega en multaj fakoj, sed ekscentrulo, tro aroganta, kaj uzanto de drogoj (kvankam nur tabako estas menciita en ĉi tiu rakonto).

Lia asistanto, doktoro Watson, aperas en multaj filmoj kiel mokinda malspritulo, sed en la originalaj rakontoj li estas la rakontanto, kompreneble, kaj nenia idioto. La rilato inter la du estas fakte interesa elemento de la rakontoj, kaj oni povas vidi, ke Holmso, kvankam li ofte ŝajnas trakti lin malĝentile, certgrade dependas de Watson. Ĝuste en ĉi tiu rakonto Watson ludas grandan kaj aktivan rolon, ĉar Holmso sendas lin



antaŭen al Devono, kun Henriko Baskervilo kaj doktoro Mortimero, kaj tie Watsono mem detektivas, sendante siajn raportojn al Londono. Tio estas lerta movo fare de la aŭtoro, ĉar ĝi ebligas pli malrapidan disvolvon de la intrigo. Holmso ne estas ideala karaktero por longa rakonto, ĉar li emas tro rapide solvi misterojn, kaj li ne emas diskuti siajn pensojn. Watsono kiel esploranto, sendanta siajn raportojn, funkcias pli bone. Kompreneble, Holmso reaperas antaŭ la fina senmaskigo.

Temas pri traduko farita de William Auld, eldonita de kompetenta eldonejo, kaj eĉ pri dua eldono. Tial oni ne atendus trovi multajn erarojn en la teksto, kaj efektive mi trovis tre malmultajn. Mi tamen sukcesis detekti kelkajn eraretojn kaj aferojn dubindajn aŭ almenaŭ diskutablajn el lingva vidpunkto.

Jen mia listo, kun alternativoj en parentezo: aliam (alifoje); Beilvero (Belivero); Belarusio (Belorusio); brulite (brulinte); Frenklendo (Franklando); geBarimoroj (Barimoroj — kiel aliloke); maltrompigita (sentrompigita); Marsini (Marcini, Marĉini); Mikelfesto (Miĥael-festo, Mikaelfesto); rafineco (rafiniteco); Regentstrato (Regentostrato — kiel aliloke); subtegmentejo (subtegmento); terurigi (teruri); tiukaze (tiuokaze — kiel aliloke); tiumonente (tiumomente);


trampli (distreti); vigilio (vigilo, atendo). Cetere, sur paĝoj 49 kaj 81 surprize mankas “la” antaŭ “Desmondoj” kaj “Stepeltonoj”, respektive.

Multe pli facilas rimarki erareton ol lerte tradukitan frazon, speciale kiam oni ne komparas ĉiun frazon kun la originalo, sed unu trafa kaj supozeble originala esprimo tamen kaptis mian atenton: “mi prenis la *Medicinan Registron* kaj elfoliumis la nomon”. Certe ne ĉiu ekhavas la ideon traduki la anglan frazon ĝuste tiel, kaj eble tiu ekzemplo taŭgus por ilustru unu manieron, en kiu tradukado postulas kreemon.

Ĉe la fino de la libro estas paĝo da notoj. Estas malfacile scii, kion oni pri-notu en tia teksto. Oni povus verki noton pri preskaŭ ĉiu propra nomo, sed tiel oni donus informojn, kiujn la leganto apenaŭ bezonas por kompreni la rakonton kaj facile trovus per Guglo aŭ Vikipedio, se li hazarde volus scii. Ĉi tie la notoj inkluzivas ok liniojn pri du pentristoj menciitaj en la teksto, sed kiom da legantoj vere volas scii iliajn datojn, naskiĝlokojn, kaj tiel plu? Aliflanke mankas noto pri: ciklopido (iu speco de papilio — ne la pavopapilio de la dorsa kovilo), skotdrapa, Stanfordo, Vaterloo. Cetere, min interesus scii, kiuj el la menciitaj lokoj (ekzemple la Grimpena Marĉo) vere ekzistas, se tiu demando estus facile respondebla. Tamen, aliajn legantojn tio verŝajne tute ne interesus.

Dum aŭgusto kaj septembro mi laboris pri listo de cent “plej legindaj tradukoj en Esperanto” (vidu <http://esperanto.net/literaturo/tradukita/>). Mi decidis enmeti *La ĉashundon de la Baskerviloj*, antaŭ ol mi povis finlegi ĉi tiun duan eldonon. Finleginte ĝin, mi certe ne bedaŭras mian decidon. Ĝi ja estas leginda, kaj mi ŝatus aldoni konsileton: indas legi ĝin atente. Eblas ja legi ĝin rapide, kaj ankaŭ ĝui ĝin tiel, sed vi eble pli ĝuos ĝin, se vi atentis pri la detaloj, pri kiuj ankaŭ la aŭtoro atentis. Eltrovu ĉe la fino, ĉu vi notis ĉion, kion Ŝerloko Holmso notis. Eble vi eĉ rimarkos indikon, kiun Holmso preteratentis!

Edmund Grimley Evans



MASTER POET OF ESPERANTO

La infana raso, la granda eposo de Vilĉjo Auld pri la situacio de la homaro en la tempo kaj la universo, nun haveblas en la lingvoj angla, skota kaj gaela, en unu 279-paĝa volumo (malmola aŭ mola kovrilo), tradukita de Girvan McKay (Garbhan MacAoidh).

Mendu ĝin ĉe esperantolit@gmail.com, aŭ ĉe www.lulu.com.


Garbhan MacAoidh

Esperanto, la muzika lingvo

Kvankam la muzik-merkata krizo plu persistas, la nuna jaro estas frukto-dona, kaj pluraj projektoj estas realigitaj kaj realigataj.

Dolchamar aperigis la albumon *Trejn tu noeŭr*. Ĉar ĝi estas plurlingva miksita projekto, naskiĝis la ideo reeldoni duan albumon tutesperantan, kaj nun la finna bando registris la Esperanto-voĉojn kaj remiksas la tuton por preparo de la albumo *Trajn' nenien*, aperonta plejverŝajne fine de novembro ĉe *Vinilkosmo*.

Vinilkosmo estas membro de la federacioj de sendependaj eldonejoj cd1d (distribuejo), Felin (Franca federacio) kaj FLIM (Mezpirenea federacio). FLIM ĉiujare organizas Forumon de Alternativoj por la Muziko (FAM), kiu ĉi-jare okazos komence de novembro.



En **FAM** *Vinilkosmo* organizos certan vesperon en la Tuluza muzika klubo *Mandala* kun kvar artistoj/grupoj, inter kiuj **Inicialoj dc** el Frankfurto, kiu lanĉos tie sian albumon *Urbano*, produktitan ĉe *Vinilkosmo*. Ĉi tiu elektropopa albumo prezentas Esperanto-kantojn kaj la muzikvideon *Berlino sen vi*.

<http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/282404>

Je la venontjara Pasko en la franca mediteranea urbo Sète okazos interasocia renkontiĝo **IREM**. Ĉar 2011 en Francio estos la jaro de Georges Brassens, IREM en Sète, la naskiĝurbo de la artisto, organizos grandan spektaklon en Esperanto de **Jacques Yvart** pri Brassens en la festsalonego de la urbo Salon-georges Brassens.

Tiukaze *Vinilkosmo*, kiu planis nur reeldoni la elĉerpitan ses-titolan albumon de Jacques Yvart *Georges Brassens en Esperanto*, faros pli ampleksan reeldonon aldonante al ĝi sep pliajn kantojn por la albumo *Brassens plu*.

En **IREM** prezentiĝos **FAMo**, Jacques Yvart, *Kaj Tiel Plu*, *Kapriol'!*, Teatro-Trupo de Tuluzo, JoMo kaj Solniŝka. Dominique Gautier premiere prezentos sian filmon pri Esperanto.

IREM ankaŭ estos unu el la punktoj de la **turneo** de la folka bando **Kapriol'!**. La bando trauros Belgion kun koncertbalo en Bruselo kaj Francion kun koncertoj en Le Mans, St-Brieuc, Bordoza regiono, Tuluza regiono, Ariejo, IREM en Sète, Kresto kaj fine en PSI en Germanio.

Dum la Havana UK oni malkovris la junan kuban bandon **Amindaj**, kiu ludas salson kaj kuban muzikon en Esperanto. La koncertoj de *Amindaj* estis tiel sukcesaj, ke oni lanĉis kampanjon por financi registradon de ilia unua albumo. Ĉar *Amindaj* ne povas forlasi sian landon, la registrado okazos en Kubo, kaj, se la kvalito de la sonregistraĵo estos alta, *Vinilkosmo* eldonos la albumon.

De pluraj monatoj Platano reĝisoras la projekton kaj jam kolektis 15 proponojn el pluraj landoj. Dubindas, ke **Hip-Hopa Kompilo 2** pretos antaŭ la jarfino, sed kiu scias?..

Rogener Pavinski, kunlaboranto de *Vinilkosmo* kaj la redaktoro de *Kontakto* baraktas por la **Metala Kompilo**.

El la nord-orienta franca urbo Colmar, **Jim Petit** lanĉis la projekton *Turna Tero* — mond-muzika koncepto, kiun li prilaboras dum pluraj monatoj per koncertoj kaj registraĵoj. Oni povas aŭskulti kaj ĝui registraĵojn kaj videon en lia paĝo ĉe Mondomix:

<http://mymondomix.com/jimpetit>

Jim Petit



En Kinŝaso la bando **Konga Espero** registris muzikvideojn de tri siaj kantoj el la **Afrika Kompilo**, kiujn *Vinilkosmo* disponigos en sia elŝutejo en rubriko "Videoj" por subteni la muzikan agadon de la bando en Kongo.

Jonny M estas la artista nomo de la 20-jara germano Jonas Marx, kiu dediĉas sin al la germana reĝea muziko. Laŭ la principo mem lerni kaj provi, li instalas ĉiam pli profesian hejman studion kaj intertempe li komisiis la miksadojn al Goldi (Goldvibes Records).



Jonny M

Kompreneble li ankaŭ spertis malsukcesojn. Sed kun multe da fantazio, energio, entuziasmo kaj amo al sia hobbio, li povas multon atingi. Jonny M neniam rezignas kaj provas konstante peri siajn mesaĝojn al la homoj, por plibonigi la mondon.

Fine de la pasinta jaro li publikigis sian albumon *Europareggae* ĉe "reggae-town.de". Antaŭ kelkaj monatoj aperis la EP *Harte Töne* ĉe "oleejah.de".

<http://www.myspace.com/jonny-m>

Li lernas Esperanton kaj planas Esperanto-albumon, kaj jam pretigis sian unuan Esperanto-reĝeon *En some-ro*, kiu estas ĉe Youtube

<http://www.youtube.com/watch?v=KP3px4HUzpg>

Esperanto ĉiam rezervas al ni surprizojn kaj novaĵojn en la arta kaj ĉefe muzika kampo... Se vi restas atentaj kaj serĉemaj, vi konstatos ke Esperantomuziko vivas kaj viglas, kvankam la Esperanta komunumo ne plu vigle interesiĝas pri akiro de Esperanta muziko sur diskoj aŭ per elŝutoj. Sed ĝis kiam?

Muzikumadis por vi

Flo!

Spegulo, aŭtuno 2010

La kovropaĝon de la aŭtuna *Spegulo* ornamas desegnaĵo de la pola artisto-esperantisto Andrzej Kolpanowicz. Kiel la redakcia materialo aperas *Programoj kaj ideoj* de I. Lejzerowicz, represita el *Pola Esperantisto* de la fora jaro 1928a.

En la rubriko *Solidaraj kun Kubo* aperas impresoj de la franca esperantisto Robert Pontnau pri Kubo en la 49a jaro de la revolucio. Fragmento el *Malserene* de la meksika verkisto kaj eseisto Octavio Paz koncentriĝas al la historio de Pollando, precipe en la 20a jc. Ĝi estas tradukita de Tomasz Chmielik same kiel la eseo *Komunumo* de la pola pastro Józef Tischner temanta pri la etiko de Solidareco. La sama tradukanto prezentas ĉerpaĵon el la *Raporto pri la milita stato* (1982–1984) de Marek Nowakowski. Pri la tri aŭtoroj enestas biografioj.

Andreas Künzli, ne trovinte informojn ĉe Lins kaj Dratwer, faras “malkovron”, ke Stalin lernis Esperanton. Sed en Soveta Unio tiu fakto estis konata, kaj dum la “perestrojka” periodo eĉ nia regiona tagĵurnalo *Na Smenu!* aperigis verkon de Trockiĵ, kiu menciis tion. Krom la rilato de Stalin al la internacia lingvo, Künzli esploras liajn opiniojn pri la nacia demando kaj pri la lingvoscienco. En la rubriko *Novaj libroj* estas prezentataj du artikolaroj: la unua kajero de *Homarane* kun detala analizo de la kontribuajoj, prezentitaj en la unua Simpozio pri Homaranismo ĉe KCE en aŭgusto 2009; kaj *Abunda fonto*, dediĉita al la hungara (inter)lingvistoj István Szerdahelyi. Lidia Ligeza recenzas du poemarojn, *Teneraj rigardoj* de Helena Dobaczewska-Skonieczka (tradukis el la pola Urszula Tupajka) kaj dulingvan (Esperantan kaj polan) *Verdaj aventuroj* de Halina Kuropatnicka-Salamon.

Sekvas omaĝo al la forpasinta historiisto Tony Judt (1948–2010). Kaj en la fino estas publikigata verdikto pri la statuetoj de *Spegulo*, kiujn por la tria fojo aljuĝis la redakcio pro honesta kaj sindonema laborado por la Esperanto-movado; ĉi-foje al Humphrey Tonkin, Baldur Ragnarsson kaj Adam Pleśnar. Por omaĝi “bravajn klopodojn kaj komunan penegon de la kongresaj [94a UK. — HaGo] organizantoj” la statuetojn ricevas bjalistokanoj Aleksander Sosna, Elżbieta Karczewska, Jan Leończuk kaj la Bjalistoka Esperanto-Societo.

Halina Gorecka

Ricevitaj libroj

Bokarjova, Antonina. *Sciencisto, esperantisto, patro: Eŭgeno Bokarjov*. — M.: Impeto, 2010. — 143 p., il.; 300 ekz. — [Donaco de Anatolij Sidorov].

Conan Doyle, Arthur. *La ĉashundo de la Baskerviloj*: Krimromano / Trad. el la angla, antaŭpar. William Auld; Notoj de Aleksander Korĵenkov. — 2a eld. — Kaliningrado: Sezonoj, 2010. — 168 p.; 400 ekz. — (Serio Mondliteraturo; №6). — [Donaco de Sezonoj].

Esperanto — instrumento de fakuloj: Kolekto de kontribuajoj prezentitaj dum la Konferenco “Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko” (KAEST), Dobřichovice, 2008 / Red., enkonduko Zdeněk Pluhař. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2009. — 134 p. — (Serio Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko, Vol. 6). — [Donaco de KAVA-PECH].

Huch, Ricarda. *La lasta somero*: [Kriminala romano] / Trad. el la germ., antaŭpar. Reinhard Haupenthal. — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2009. — 107 p. — [Recenzoekzemplero].

Kongresa libro: REK-26. Sankt-Peterburgo, 2010 / [Komp. Anatolij Sidorov]. — [SPb]: [O.K. de REK-26], 2010. — 43 p., il.; [300 ekz.]. — [Donaco de Svetlana Smetanina].

Линецкий, Михаил Яковлевич. *Золотая книга эсперанто*: Полный учебник международного языка. — Киев: Изд. дом “Богдан”, 2006. — 160 с., ил.; 30 000 экз. — [Donaco de Anatolij Sidorov].

Ricevitaj gazetoj

Bulteno de Esperantista Klubo en Praha, 2010/2; Esperanto, 2010/10; KAE-Infomilo, 2010/72; La Brita Esperantisto, 2010/969; La Ondo de Esperanto, 2010/10; La Revuo Orienta, 2010/8-9; Literatura Foiro, 2010/246; Monato, 2010/10; Norvega Esperantisto, 2010/4; Pola Esperantisto, 2010/1,2,4; REGo, 2010/5; Spegulo, 2010/3; Usona Esperantisto, 2010/5.

Literatura Foiro, 2010, №246

Poemo de Marie-France Conde Rey pri legendo el Ĵumiljak inaŭguras la aŭgustan numeron de *Literatura Foiro*, numero 246 en la senpaŭza pli ol 40-jara serio. Aliaj originalaĵoj en la 56-paĝa revuo: poemoj de Jaroslav Krolupper kaj eta rakonto de Etel Zavadlav.

En la diversaj rubrikoj pri mondliteraturo oni trovas la unuan akton de *Kvarteto* de Ronald Harwood en traduko de Giorgio Silfer; la duan parton de la artikolo de Katharina Raabe pri la evoluo de la mezeŭropaj literaturoj de post 1989; prelegon de Liljana Stefanova prezentitan dum la Balkana PEN-konferenco; esploron de Márton Fejes pri privataj lecionoj de Esperanto ĉe sinjoro instruisto Schwarz — temo en la romano *Szalka*, *Szalka* de István Futaky.

La numero informas pri la somera aktivado en KCE, pri la asigno de la PEN-Premio *La Verko de la Jaro 2009*, kiu iris al *Kajto* de Mikaelo Bronŝtejn. Kaj okaze de la 70-jariĝo de Anatolo Gonĉarov aperas lia bibliografio. Pri mil kvincent legendaj rakontoj estas la eseo de Leen Deij. En la rubriko *Kultura agendo* — nun pri arkitekturo. Donald Broadribb recenzas la prozan libron *La sola absolvita* de Massimo Acciai.

En 2010 la koloraj kovriloj estas dediĉitaj al legantaj virinoj. En la aŭgusta numero: Carl Larsson per bildo pentrita en 1888.

HeKo

Kun ĉi tiu kajero de *La Ondo* ni dissendas al niaj ruslandaj abonantoj la liston de la gazetoj aboneblaj en 2011, UEA-kotiztabelon 2011, kaj la Unuan Informilon pri la 96a Universala Kongreso en Kopenhago.

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

“Antaŭ cent jaroj *La Ondo* publikigis interesajn, sed nekutimajn enigmojn. Mi konfesas, ke mi sufiĉe multe cerbumis por solvi ilin! Mi ĝuis grandan plezuron tion farante! Dankon!” — skribis Jackie Huberdeau pri nia aŭgusta-septembra tasko.

Efektive, al la enigmoj el la antaŭtelevida epoko respondis nur Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio) kaj Vjaĉeslav Rojdestvenskij (Ruslando).

Ni gratulas ilin, kvankam neniu el ili trovis ĉiujn ĝustajn respondojn!

La solvoj de *Jackie Huberdeau* kaj *Vjaĉeslav Rojdestvenskij* havis po kvar koincidojn kun la respondoj de niaj antaŭuloj, tial ili ricevas libropremion. Gratulon!

La ĝustaj respondoj: 1. sian similulon (=samrangulon); 2. pia pastro donis al almozulo piastron; 3. ĝi kuros en la alian duonon; 4. doloro — dolaro; 5. komon (2, 3); 6. eĥo (gramofono).

Ni petas pardonon al Anna-Liisa Ali-Simola (Finnlando) kaj Nikolaj Neĉajev (Ruslando), kiuj sendis ĝustan solvon de la proverbo-enigmo, sed kies nomoj ne aperis inter la solvintoj en la oktobra *Ondo*.

Proverboj trovendaj

Necesas solvi la enigmon de nekonata skribaĵo. En la suba teksto kaŝiĝas du proverboj el la *Proverbaro Esperanta* de Zamenhof. Ĉiu simbolo/signo prezentas unu literon, samaj simboloj do estas samaj literoj. Ofte uzataj simboloj kaj mal-longaj vortoj eble helpas al vi trovi la “ŝlosilon” por la solvo.

La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de decembro.

Kompilis **Nora Caragea**

∅# € ∇≈⊆ ⊆≈≠ € ∇≈⊆
∅≠⊥∅∴∅≠ € ∇∅*≈⊆.
⊆#∇ ⊆∅σ≠#*σ⊆ ∇∅§
⊥#∇≥⊆∇⊆ ≠∇∇σ#≠∅≠ Ω≡∇
∴∅χ⊆∇.

Anekdotoj el Pollando

Virino havas en sia vivo tri periodojn:

- En la unua periodo ŝi nervozigas sian patron.
- En la dua periodo ŝi nervozigas sian edzon.
- En la tria periodo ŝi nervozigas sian bofilon.

Al florvendejo eniras viro kaj anoncas, ke li volas aĉeti florojn.

Vendistino: Kompreneble. Pri kiuj vi pensas?

Kliento: Mi mem ne scias. Hm....

Vendistino: Permesu, ke mi helpu vin. Pri kio vi kulpas?

- Rigardu kia belega virino!
- Sed memoru pri tri infanoj!
- Nekredeble! Ŝi jam havas tri infanojn!
- Ne ŝi, sed vi havas....

Tradukis membroj de la Esperanto-Klubo en Olsztyn.

Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Ĉu ni havas solvon aŭ problemon?

Esperanto estas ne sole simpla lingvo, sed grava socia problemo. (*La Mondo de Esperanto*, 2010, №5-6, slogano sur la kovrilo; rimarkis Ionel Oneț)

Corsetii povas scii, aŭ: Opiniio pri ĉio kaj nenio

Corsetii opinias ke AdE havu sian ĝeneralan vortaron. (Stano Marček. Demandoj al la Akademio // *Esperanto*, 2010, №9, p. 178)

Ĉu ankaŭ malankaŭ, ne malnur malantaŭ? aŭ: Eble pli facilus post

Sekvis demandoj de la publiko... pri “Malankaŭ”.... Ĉe “malantaŭ” estas malfacile kompreni la signifon. (Samloke, p. 178-179)

Sen fervoro, sen fervojo, aŭ: Elreliĝantoj serĉas kapron

... neniu volis alfronti la relan realon, kaj ĉiuj pli facile volis trovi porpekan kapron. (Renato Corsetti, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6051>, 25 sep 2010)

Intruado por kvalifikitoj

La modernaj metodoj de intruado... estos traktitaj en aparta simpozio de lektoroj. Ne mankas en la programo la tradiciaj 20-tagaĵaj kursoj por preparado de kvalifikitaj lektoroj... (*Debrecena Bulteno*, 1986, №31, laŭ bulteno.netai.net/index.php?option=com_content&view=article&id=96:numero-031&catid=1:friss-hirek&Itemid=108)

Eĉ kristanoj

La Kristana Instrua Centro proponas... du nivelojn de intruado. (eso.centredereformationchretienne.net/index.php?option=com_content&view=article&id=51&Itemid=57, stato 21 okt 2010)

Ĉu Kamasutre?

... intruisto devas krei kaj konstrui multajn ekzercojn... (Zlatko Tišljar. Konkludoj pri Esperanto-instruado post 10-jara laboro kun nemotivitaj gejunuloj // *Eŭropa Bulteno*, 2009, №9-10, p. 3)

Tiuj katolikaj irlandanoj

Du piaĵ aferoj estas interesaj... (Seán Ó Riain: EEU en Universala Kongreso, Eŭropa Bulteno, sep.-okt. 2009, p. 4; trovis Lu Wunsch-Rolshoven)

Najbaroj kaj boroj

UEA subskribis interkonsenton pri kunlaborado kun ITK. (Informo al la Komitato pri plenumo de la komitataj decidoj en Roterdamo, jul 2009, Bjalistoko)

Denis Rock Tamba el Germanio (...) estis proksima kunlaboranto de *Esperanto-Desperado*... (*Informletero de Vinilkosmo*, 2005, №13)

Plukis **István Ertl**

Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

Britio: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-tô, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630

Pollando: PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

Portugaliao: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530




Esperanto-urbo. Esperantlingva tabulo estis starigita antaŭ la Interkultura Centro Herzberg: ĝi montras al la interna ĝardeno, kie kreskas, interalie, Esperanto-rozo, Esperanto-tulipo kaj Esperanto-klematito. ICHanoj kaj vizitantoj post la inaŭguro plantis tie la novan rozon kun la nomo D-ro Zamenhof. (ICH)




Pollando. En la riĉa koncerta programo de ARKONES en Poznano (vd. p. 6) egan popularecon ĝuis la frisa grupo *Kapriol'*, kiu dancigis la partoprenantojn laŭ la balfolka stilo kun tradiciaj parodancoj, vicodancoj kaj rondodancoj. Ili ne nur muzikis kaj kantis, sed ankaŭ instruis dancadon. (Maria Mickle)




Britio. En la Liverpola apudurbo Crosby proksime de la stacidomo Waterloo funkcias restoracio *Esperanto*. Ĝi proponas bonkvalitajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn en agrabla etoso, semajnfajnajn dancnoktojn kaj disponigas konferencojn en la supra etaĝo. Sur la foto estas nia legantino Diana Aitai. (Peeter Aitai)



Aleksander Korĵenkov. *Zamenhof*
Serio *Scio*, Volumo 9
64 paĝoj, 6 eŭroj



Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj*
Serio *Mondliteraturo*, Volumo 6
168 paĝoj, 15 eŭroj



Dek libroj / Kompilis Aleksander Korĵenkov
Serio *Nia Trezoro*, Volumo 1
32 paĝoj, 4,50 eŭroj



Dek gazetoj / Kompilis Aleksander Korĵenkov
Serio *Nia Trezoro*, Volumo 2
32 paĝoj, 4,50 eŭroj